

EL POPOLA ĈINIO
9
1976
中国报道





Intima Rilato (ĉinstila pentrajo)

# Por prikanti la Grandan Proletan Kulturan Revolucion




Kantado de "Revizito al Ginggang-monto" kaj "Dialogo de Du Birdoj"



Laboristoj kanta[s] "Bona Estas l[a] Diktaturo de l[a] Proletaro".

Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kantas "Bonaj Estas la Novaj Socialismaj Aferoj".






ĈPLA-anoj kantas "Levu la Revoluciajn Ferajn Pugnojn".


Por memorigi la 34-an datrevenon de la publikigo de la verko de Prezidanto Maŭ "Paroladoj ĉe la Literatura Kaj Arta Kunsido en Jan-an", 18,000 laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj el diversaj frontoj de Pekino okazigis en la Ĉefurba Sporta Halo kantokunvenon por varme prikanti la Grandan Proletan Kulturan Revolucion, la grandan venkon en rebato al la dekstra deviaciisma vento celanta renversi la ĝustajn verdiktojn kaj la grandan venkon de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La kunveno malfermiĝis per kantado de "Ruĝas la Oriento". La kunvenantoj laŭte kantis ankaŭ la poemojn de Prezidanto Maŭ "Revizito al Ginggang-monto" kaj "Dialogo de Du Birdoj" adaptitajn al sonoraj kaj patosaj melodioj.

Tiu ĉi kunveno de amasa kantado estas grandioza kunveno por prikanti la brilan venkon de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj ankaŭ por kritiki la reviziisman linion de Deng Hiaŭping. La laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de la kunveno kantis pli ol 40 kantojn en formoj de plurvoĉa aŭ unisona kantado, kantado kun gestoj, kantado kun klakilo, tamtamo kaj tamburo k.s.

Por celebri la datrevenon, multaj fabrikoj, minejoj, popolaj komunumoj antaŭurbaj, institucioj, lernejoj kaj magazenoj de Pekino okazigis diversformajn amasajn kantkunvenojn, persiste prenante klasbatalon kiel la ĉefĉeneron. La revoluciaj kantoj ludas rolon en la granda batalo por rebati la dekstran deviaciisman venton celantan renversi la ĝustajn verdiktojn kaj kuraĝigas la popolanojn por gajni ankoraŭ pli grandajn venkojn.


坚决拥护党中央两项决议
毛主席




Gestokantado de "Unuiĝu ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio Estrata de Prezidanto Maŭ"



Kantado de "Batalu ĝis la Fino kontraŭ la Dekstra Deviaciisma Vento Celanta Renversi la Gustajn Verdiktojn" kun klakado, tamtamado kaj tamburado en akompano.

Ruĝgvardianetoj kantas "La Ruĝa Standardo Ĉiam Flirtu".



EL POPOLA ĈINIO
中国报道

N-ro 9
(218)
1976

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Kovrilo:

Paĝo 1: Per siaj propraj fortoj Ĉinio konstruis trunkan linion de koncentra kabloportilo kun 1,800 voĉkanaloj inter Pekino, Ŝanhajo kaj Hangĝoŭ. La foto montras ke teknikistinoj ekzamenas ondoportan ekipajon.

Paĝo 2: Intima Rilato (ĉinstila pentraĵo)

Paĝo 3: Ventumiloj de Suĝoŭ
(1) Silka ventumilo
(2) Ventumiloj el eburo aŭ santalligno
(3) Pentrado sur ventumiloj

Paĝo 4: La domo por longdistanca telefono nove konstruita en Pekino

Bildpaĝoj:

1. Por prikanti la Grandan Proletan Kulturan Revolucion
2. Montregiono antaŭe malriĉa, nun abunda je fiŝo kaj rizo
3. Medicino en servo al kamparo



## Enhavo

Higiena revolucio en Ĉinio . . . . . . . . . 2

Organiziĝo por likvidi malsanojn . . . . . . . . 11

Bona estas la koopera kuraca sistemo . . . . . 19

Li fariĝis labormodelo . . . . . . . . . . . 21

Trunka linio de mikroonda komuniko konstruita en Ĉinio . . . . . . . . . . . . . . . . 24

Mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj de Guangdong-provinco . . . . . . . . . . . . . . 27

Hiahian-gubernio plene verdigita . . . . . . . . 32

Kelkaj rakontoj pri ruĝgvardianoj . . . . . . . 39

AMIKECO: Ekspozicio de Ĉinaj Metiartaĵoj en Novzelando . . . . . . . . . . . . . . . 40

ĈINAJ NACIECOJ: La bulangoj . . . . . . . . 41

HISTORIAJ RAKONTOJ: La Flavturbana Insurekcio . . . . . . . . . . . . . . . 44

METIARTAĴOJ: Novaj jadaj skulptaĵoj de Pekino . 46

KURANTAJ AFEROJ . . . . . . . . . . . 23, 48


# Higiena revolucio

*Legantoj skribis al ni de tempo al tempo, ke ili interesiĝas pri nia higiena revolucio kaj esperas, ke ni raportos pri ĝi pli multe. Por helpi la legantojn pli bone koni la revolucion en nia higiena fronto kaj la profundajn ŝanĝiĝojn de ĝi alportitajn al la higiena laboro, ni intervjuis laborantojn de la Ministerio de Higienaj Aferoj. Ĉi sube sekvas klarigoj pri kelkaj problemoj.*

— La Redakcio

## KIAL METI LA GRAVITAN PUNKTON DE NIA KURACA KAJ HIGIENA LABORO EN LA KAMPARON?

**"Meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon"** estas grava paŝo farita en la higiena revolucio de Ĉinio. Por kompreni la necesecon kaj profundan signifon de tiu paŝo, oni devas unue koni la staton de la higiena laboro en la malnova Ĉinio. Antaŭ la Liberiĝo, Ĉinio estis lando duonkolonia kaj duonfeŭda kun tre malbonaj kuracaj kaj higienaj kondiĉoj kaj tre malmultaj kuracaj institucioj, kies plejparto koncentriĝis en la grandaj urboj kaj servis al la ekspluataj klasoj. En tiu tempo, la vastaj popolamasoj, precipe la kamparanoj, disponis pri nenia medicina servo kaj miloj kaj miloj el ili perdis sian vivon pro malsanoj ĉie cirkulantaj.



*Nudpieda kuracistino Vu Jumej (la maldekstra) de Giahiang-gubernio de Henan-provinco ofte iras al hejmoj de komunumanoj por doni kuracservon.*

# ...en Ĉinio

Post la naskiĝo de la nova Ĉinio, Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio multe zorgas pri la sano de la popolo kaj donis unu post alia gravajn instrukciojn, kiel ekzemple servigi la higienan laboron al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, preni preventadon kiel la ĉefan metodon kontraŭ malsanoj, mobilizi la amasojn al batalo kontraŭ malsanoj kaj kombini la ĉinan medicinon kun la okcidenta, kaj alprenis multajn metodojn por disvolvi la kuracan kaj higienan aferon. Sed antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, Liu Ŝaŭki kaj liaj sekvantoj ne plenumis la proletan higienan linion de Prezidanto Maŭ. Ili konsumis plejparton de la homaj kaj materiaj fortoj kaj monrimedoj de medicino en servo al malmultaj homoj en la urboj kaj ne radikale ŝanĝis la staton, ke al la vastaj laborantaj popolamasoj, precipe al la kamparo, mankis kuracistoj kaj medikamentoj.


*La unua nudpieda kuracistino Vang Guiĝen (la maldekstra)*

Ĉu servi al la plejmulto aŭ nur al malmulto estas la fokuso de la longa batalo inter la proleta higiena linio kaj la reviziisma higiena linio. Ĉinio havas okcent milionojn da loĝantoj, kies plejparto estas kamparanoj. Se la higiena laboro ne servas al ili, ĝi certe misiros sur la eraran reviziisman vojon, kaj babilo pri servado de higiena laboro al la plejmulto sen konsidero pri la kamparanoj ja restas vanta. La 26-an de junio, 1967, Prezidanto Maŭ akre kritikis la Ministerion de Higienaj Aferoj, ke ĝi ne estas popola ministerio de higienaj aferoj kaj devas esti alinomata kiel "Ministerio de Higienaj Aferoj por Urbaj Sinjoroj", kaj samtempe li instrukciis **"meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon".**

## LA ĈEFAJ KRIMOJ DE LA "MINISTERIO DE HIGIENAJ AFEROJ POR URBAJ SINJOROJ"

En la 17 jaroj antaŭ la kultura revolucio, la ĉefa respondeculo de la Ministerio de Higienaj Aferoj turnis tiun ministerion en "Ministerion de Higienaj Aferoj por Urbaj Sinjoroj" plenumante la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki en higienaj aferoj, kaj el tio rezultis seriozaj malutiloj.



*Kuracistino de Tiangin, kiu nun fikse loĝiĝis en la Longlin-a Diversnacieca Aŭtonoma Gubernio de Guanghi, faras ekzamenadon al mjaŭ-a komunumanino.*

En tiu tempo, 90 pocentoj de la medicinaj laborantoj kaj pli ol 80% de la malsanulaj litoj de hospitaloj troviĝis en la urboj. Pli ol du trionoj de la tutlanda higiena elspezo estis uzitaj en la urboj; la litoj en la sanatorioj servantaj al malmultaj homoj estis eĉ pli multaj ol tiuj en la hospitaloj de la popolaj komunumoj en la kamparo; nemalmultaj hospitaloj kaj sanatorioj efektive servis nur al malmultaj urbaj sinjoroj, kiuj ĉiam alarmis siajn malsanetojn kaj vivis en komforto, dum al la kamparo mankis kuracaj rimedoj. La malnova Ministerio de Higienaj Aferoj funkciis 17 jarojn, tamen pli ol 90 pocentoj de la popolaj komunumoj en la kamparo ne havis sian kuracejon por ne paroli pri la produktaj brigadoj kaj taĉmentoj.

La malnova Ministerio de Higienaj Aferoj ne zorgis pri la bezonoj de la kamparo ankaŭ en medicinaj edukado kaj esplorado. Iuj medicinaj institucioj ne studis pri kuracado kaj preventado de la oftaj kaj ripetiĝemaj malsanoj kiuj serioze malutilas al la sano de la popolo, sed fervore sin okupis pri "altaj, malfacilaj kaj profundaj" temoj, senrilataj al la realo. La diagnozaj kaj kuracaj metodoj instruitaj en la medicinaj institutoj ofte estis senutilaj en la kamparo. Nemalmultaj studentoj ne volis labori en kamparo, bazaj unuoj kaj landlimaj regionoj.

Ĉu la malnova Ministerio de Higienaj Aferoj, kiu malzorgis la kamparon, zorgis la sanon de la laboranta popolo en la urbo? Ne. En tiu tempo, la gvidanteco de nemalmultaj kuracaj institucioj ne estis tenata de la proletaro. Ili ne nur ne edukis la medicinajn laborantojn per proletaj pensoj, sed male ilin venenis per burĝaj pensoj "famiĝi per unu sukcesa malfacila operacio" kaj "rikolti kaj honoron kaj monon per verko de unu libro", kaj pro tio burĝa stilo inundis iujn instituciojn kaj la laborantaj popolanoj estis flegme traktataj. Nemalofte okazis, ke malsana laborulo en urbo estis malzorgeme traktata aŭ eĉ pelita el hospitalo sen kuraco.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, vastaj amasoj kaj revoluciaj medicinaj laborantoj indigne detruis la "Ministerion de Higienaj Aferoj por Urbaj Sinjoroj", forte kritikis la kontraŭ-

revolucian reviziisman linion de higienaj aferoj de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, serioze plenumis la instrukcion de Prezidanto Maŭ **"meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon"**, levis potencan proletan higienan revolucion kaj malfermis brilan paĝon en la historio de la kuraca kaj higiena afero de nia lando.

## PROFUNDAJN ŜANĜIĜOJN ALPORTIS LA HIGIENA REVOLUCIO

La ĉefa ŝanĝiĝo estas, ke la proleta higiena linio de Prezidanto Maŭ estas plenumata, la gravita punkto de la kuraca kaj higiena laboro estas iom post iom transmetita al la kamparo, oni fundamente ŝanĝis la longe ekzistintan staton de manko aŭ malsufiĉo de kuracistoj kaj kuraciloj en la kamparo, rimarkinda sukceso estas akirita en mobilizado de la amasoj al batalo kontraŭ malsanoj kaj la problemo de preventado kaj kuracado de malsanoj al la centmilionoj da kamparanoj estas solvata paŝon post paŝo.

Post kiam Prezidanto Maŭ instrukciis, en septembro kaj decembro de 1968, la publikigon de la enketa raporto pri kulturado de nudpiedaj kuracistoj fare de la popola komunumo Gianggen de Ĉuanŝa-gubernio de Ŝanhajo kaj la raporto pri starigo de koopera kuraca sistemo fare de la popola komunumo Lejuan de Ĉangjang-gubernio de Hubej-provinco, la vastaj popolamasoj estas multe stimulataj en starigo de medicinaj servoj. La novaj socialismaj aferoj de nudpiedaj kuracistoj kaj koopera kuraca sistemo rapide disvastiĝis tra la tuta lando. Je la fino de 1975, la nombro de nudpiedaj kuracistoj en la tuta lando jam superis 1,500,000 kaj 85 pocentoj de la popolaj komunumoj kaj produktaj brigadoj en la kamparo jam starigis kooperan kuracan siste-

*Li-a nudpieda kuracistino studanta en la medicina kolegio kuracas infanon.*



mon. Kaj krome, en uzo de la homaj kaj materiaj fortoj kaj monrimedoj de medicino la higienaj institucioj jam iom post iom transmetis la gravitan punkton al la kamparo. Kuracistoj kaj aliaj medicinaj laborantoj de urboj kaj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo faris rondiran kuracadon al la kamparo je pli ol 1,100,000 personfojoj, pli ol 100,000 medicinaj laborantoj translokiĝis en la kamparon kaj plejparto de la diplomitoj de medicinaj institutoj estas senditaj en la kamparon. Nun ĉiu gubernio jam havas sintezan hospitalon, la pli ol 50,000 popolaj komunumoj jam havas sian kuracejon kaj en la kamparo jam unuapaŝe formiĝis reto de medicina servo kun koopera kuraca sistemo kiel la bazo.

La higiena revolucio akcelis la reformon de la medicinaj esplorado kaj edukado. La reviziisma linio en medicinaj esplorado kaj edukado estas abolita. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ, la medicinaj laborantoj, la instruistoj kaj studentoj de medicinaj institutoj funkciigas medicinajn institutojn kaj lernejojn kaj medicinan laboron kun malfermita pordo. Ili iris profunden en la kamparon, fabrikojn kaj minejojn por kombiniĝi kun laboristoj kaj kamparanoj kaj starigi al si sentimenton de laboristoj kaj kamparanoj. Kune kun higienaj laborantoj en la bazaj unuoj, ili energie faris amasan movadon por aktive preventi kaj kuraci malsanojn, faris esploradon pri oftaj kaj ripetiĝemaj malsanoj en la kamparo, pri epidemioj, lokaj malsanoj, profesiaj malsanoj de fabrikoj kaj minejoj kiel ezofaga kancero, Keŝan-malsano kaj skistosomozo, kiuj serioze malutilas al la sano de la popolo, kaj atingis novajn sukcesojn. La ĉinaj medicinaj laborantoj ankaŭ aktive iras la vojon de kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinoj. Ili klopodas por heredi la patrolandan medicinon kaj en la lastaj jaroj akiris novan progreson en akupunktura anestezo, rekunigo de rompitaj membroj, kuracado de grandarea brulvundo kaj aliaj. En la eduka revolucio, la medicinaj institutoj kaj lernejoj mallongigis la lernoperiodon kaj prenas klasbatalon kiel la ĉefan lernobjekton, la medicinaj lernobjektoj estas zorge elektitaj, lernado en praktiko estas akcentata, la diplomitaj studentoj povas labori memstare kaj konkure postulas permeson iri labori en la kamparo, landlimaj regionoj kaj plej malfacilaj lokoj. Tiaj studentoj estas tre

*Bone instalita operacia ambulanco kun altprema oksigenprovizujo, en kiu oni povas fari operacion samtempe al 6-8 pacientoj.*



bonvenaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj ĉie en la lando.

En la higiena revolucio, vastaj amasoj de medicinaj laborantoj iris kun revolucia entuziasmo al fabrikoj, kamparo kaj limregionoj por ricevi reedukon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj iom post iom starigas la penson de tutkora servado al la plejmulto. De la praarbaroj de la Granda Hing-an-montaro en nordorienta Ĉinio ĝis la alta frosta montregiono de Tibeto, de la maldense loĝata Gobio ĝis la insularoj en la Suda Ĉina Maro, de lokoj trafitaj de katastrofo kaj bezonantaj medicinan servon ĝis konstruejoj por reformi la naturon, ĉie aktivas medicinaj laborantoj. Multaj el ili oferas siajn sangon kaj haŭton en savado de pacientoj kaj iuj eĉ faris eksperimentojn de kuracado sur sia korpo riskante sian vivon. Ili savis multajn homojn de morto kaj ricevis varmajn laŭdojn de la laboranta popolo.


La grandaj sukcesoj atingitaj de la higiena revolucio akre kontrastas kun la rezultaĉoj alportitaj de la "Ministerio de Higienaj Aferoj por Urbaj Sinjoroj". Nun la penetriva revolucio sur la higiena fronto estas profunde disvolviĝanta kaj la vastaj amasoj de medicinaj laborantoj rezolute faras pli grandan kontribuon al la disvolvado de la higiena afero de nia lando.

## KIEL NASKIĜIS LA NUDPIEDAJ KURACISTOJ KAJ KIAN ROLON ILI LUDAS?

La nudpiedaj kuracistoj estas kamparaj kuracistoj el membroj de kamparaj popolaj komunumoj. En ordinara tempo ili partoprenas en kolektiva produkta laboro en la brigadoj kaj kiam estas necese ili iras al pacientoj por doni medicinan servon. Ili ricevas enspezon ĝenerale egalan al tiu de aliaj komunumanoj. La unuaj nudpiedaj kuracistoj de Ĉinio naskiĝis en la popola komunumo Gianggen en antaŭurbo de Ŝanhajo. Ĉar en suda Ĉinio estas multaj akvokampoj, kaj la komunumanoj kutime laboras nudpiede en la kampoj, tial oni nomas tiujn kuracistojn kiuj ne forlasas kolektivan kamplaboron per la intima nomo "nudpiedaj kuracistoj".

Ĉinio estas tre vasta lando, la kamparanoj, precipe la montanoj, loĝas en diseco kaj estas malfacile por ili viziti kuracejon. La nudpiedaj kuracistoj plejparte devenis de kamparanoj kaj havas profundan amon al la kamparanoj dank' al politika edukado. Anstataŭ atendi pacientojn en la kuracejo laŭ la malnova kutimo, ili meminiciate vizitis la pacientojn. En la montregionoj kun dise loĝantaj kamparanoj, la nudpiedaj kuracistoj grimpas trans montojn kun medikamenta kesto malgraŭ ventego kaj pluvo por doni necesajn medicinajn servojn al la popolanoj. En multaj vilaĝoj, malsanaj kamparanoj povas ricevi kuracon en la vilaĝo aŭ en sia hejmo. La nudpiedaj kuracistoj prenas sur sin la baznivelan higienan laboron en la kamparo, ili rezolute plenumas la politikon preni preventadon kiel la ĉefan metodon kontraŭ malsanoj, mobilizas la amasojn por fari patriotan higienan movadon, propagandas higienajn sciojn kaj preventas malsanojn. Kaj krome ili ankaŭ propagandas pri naskoregulado kaj higieno de virinoj kaj infanoj. Ili

*La pekina intelekta junulo Sun Liĝe (la dua de maldekstre) en Jan-an jam fariĝis nudpieda kuracisto kaj povas fari malfacilan operacion.*






*Nudpiedaj kuracistoj skribas dazibaŭojn por rebati la dekstran deviaciisman venton celantan renversi la ĝustajn verdiktojn.*

mem kulturas kaj kolektas drogherbojn, faras medikamentojn, vaste kolektas popolajn receptojn kaj faras sian kontribuon al riĉigado de la medicina trezorejo de la patrolando.

Post trejnado kaj praktikado, nun plejparto de la nudpiedaj kuracistoj jam povas kuraci oftajn kaj ripetiĝemajn malsanojn en sia loko per la ĉina kaj okcidenta medicinoj kaj fari diversajn simplajn operaciojn. Iuj el ili povas memstare kuraci iujn malfacilajn malsanojn, doni urĝan helpon al krizaj malsanuloj kaj fari relative komplikajn operaciojn kiel amputo de tumoro. Iuj nudpiedaj kuracistoj kuracis per akupunkturo surdamutulojn kaj infanojn kun sekvaĵo de poliomjelito. Iuj nudpiedaj kuracistoj povas doni necesan helpon al kazoj de nenormala akuŝo, kaj fari abortigon kaj rompon de salpingoj.

La granda armeo de nudpiedaj kuracistoj maturiĝantaj en praktikado jam fariĝis nova potenca trupo en la higiena revolucio de la ĉina kamparo.

## KIAL PRAKTIKI KOOPERAN KURACAN SISTEMON KAJ KIO ESTAS ĜIAJ AVANTAĜOJ?

La koopera kuraca sistemo estas socialisma nova afero aperinta samtempe kun la nudpiedaj kuracistoj en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ĝi estas kolektiva bonstatiga sistemo en la ĉina kamparo starigita laŭ la principo de memvolo, estas granda kreaĵo de popolkomunumanoj en batalo kontraŭ malsanoj per kolektivaj fortoj.

La koopera kuraca sistemo postulas ĝenerale, ke ĉiu komunumano pagu 0.5-1 juanon en ĉiu jaro kiel kuracan pagon, tiu sumo plus sumo liverata de la produkta taĉmento el la komuna bonstatiga fonduso formis la fonduson, per kiu oni fondas kooperan kuracejon. Por ricevi kuracon de tia kuracejo la komunumanoj ĉiufoje pagas nur 3-5 cendojn kiel enskriban pagon kaj ne bezonas pagi por la kuracado kaj kuraciloj. Pacientoj de gravaj malsanoj, kiujn la koopera kuracejo ne povas kuraci, povas sin turni al hospitalo de popola komunumo aŭ urbo kaj ricevi kuracadon tute aŭ parte je la pago de la koopera kuracejo. Dank' al praktiko de tiu sistemo, multe malpeziĝis la ekonomia ŝarĝo sur la komunumanoj. Ili diris: "Antaŭe la tuta familio malĝojis pro malsaniĝo de unu familiano, sed nun malsanulo povas ricevi helpon de la tuta kolektivo kaj finiĝis la antaŭa senhelpeco."

La koopera kuraca sistemo ricevis aktivan subtenon de la komunumanoj. Sub influo de la nudpiedaj kuracistoj kaj higienaj laborantoj, la

komunumanoj mem kolektis, kulturis kaj prilaboras drogherbojn, aktive partoprenas en patriota higiena movado por preventi epidemiojn, dank' al kio rimarkinde pliboniĝis la higiena stato en la kamparo. Nun tiu kuraca sistemo pli kaj pli firmiĝis.

## KIAL URBAJ KURACISTOJ IRAS EN LA KAMPARON?

La iro de urbaj kuracistoj en la kamparon estas grava paŝo de la ĉinaj medicinaj laborantoj por efektivigi la proletan higienan linion de Prezidanto Maŭ kaj servi al la plejmulto de la popolo kaj tio ankaŭ estas efika paŝo por ili konscience iri la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj kaj kamparanoj, reformi sian mondkoncepton kaj plifortigi sian proletan ideologion. Ilia revolucia ago estas varme subtenata de la vastaj amasoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Nun ĉiujare la hospitaloj kaj aliaj medicinaj institucioj en la grandaj urboj de Ĉinio sendas parton de siaj kuracaj laborantoj por formi kuracajn taĉmentojn al kamparo, precipe al nacimalplimultaj kaj landlimaj regionoj por rondira kuracado. Ĉar en tiuj regionoj la higienaj kondiĉoj estas malpli bonaj kaj estas pli necese pliapaŝe disvolvi la higienan aferon, kvankam la ŝtato jam fondis en ili nemalmultajn hospitalojn kaj kulturis kuracistojn de nacimalplimultoj. Tie la rondiraj kuracaj taĉmentoj ne nur kuracas malsanojn por la amasoj, sed ankaŭ kulturas grandan nombron da medicinaj laborantoj kaj nudpiedaj kuracistoj de la lokoj kaj helpas ilin starigi kuracajn organizaĵojn.

Dum la rondira servado, la medicinaj laborantoj akceptas reedukon de la malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj paŝtistoj, tio povas plifirmigi ilian volon tutkore servi al la popolo, stimuli ilin senĉese rebonigi kuracan stilon kaj post reveno al la urboj antaŭenpuŝi la higienan revolucion de la urbaj hospitaloj. En la pasintaj dek jaroj la fama Pekina Hospitalo organizis 25-foje kuracajn taĉmentojn, kiuj iris al kamparo kaj paŝta regiono por fari rondiran kuracadon, kaj krome pli ol 80 el ĝiaj medicinaj laborantoj iris al nordokcidenta Ĉinio por fiksloĝadi tie. Tamen tio neniom malhelpis la ple-

*Medicinaj laborantoj de Luhi-gubernio trejnas nudpiedajn kuracistojn por bazaj unuoj.*



numon de la ĉiutaga laboro de la hospitalo, kaj kelktempe medicinaj laborantoj de la hospitalo povas iri al fabrikoj por kuracado al la amasoj. Similaĵo okazas ankaŭ en aliaj hospitaloj de Pekino kaj aliaj urboj.

## KION ALIAN LA ŜTATO FARIS POR DISVOLVI LA HIGIENAN AFERON EN LA KAMPARO?

Por disvolvi la medicinan kaj higienan aferon en la kamparo, la ŝtato uzis pli ol duonon de sia tuta elspezo de higiena afero por provizi la gubernian kaj komunumajn hospitalojn per medikamentoj, kuracaj ekipaĵoj kaj monsumoj depost la komenco de la kultura revolucio.

Sekve de la disvolviĝo de la medikamenta industrio de Ĉinio, en 1969 refoje grandskale reduktiĝis la prezoj de multaj medikamentoj tra la tuta lando. La prezoj estis malaltigitaj meznombre je 37 pocentoj, kaj je pli ol 80 pocentoj kompare kun tiuj en 1950. Dank' al tio multe malpeziĝis la ŝarĝo sur la popolamasoj en kuracado de malsanoj. Medikamentoj por naskoregulado kaj kuracado de lokaj malsanoj estas senpage akiratej, kaj krome ankaŭ kelkdek specoj de medikamentoj kontraŭ epidemioj estas senpage liverataj al la kamparo. En iuj regionoj de nacimalplimultoj senpaga kuracado estas praktikata ĝis nun.

En la lastaj jaroj ni produktis grandan kvanton da diversaj medicinaj instrumentoj konvenaj al la kamparo. Ĉiujare la ŝtato liveras ĉiam unue al la kamparo grandan kvanton da medikamentoj. Nun plejparto de la komunumaj hospitaloj jam havas X-radian aparaton, simplan operacian stablon, mikroskopon k. a. medicinajn ekipaĵojn.

## ĈU LA BATALO KONTRAŬ LA DEKSTRA DEVIACIISMA VENTO CELANTA RENVERSI LA ĜUSTAJN VERDIKTOJN KONCERNAS ANKAŬ LA HIGIENAJN RONDOJN?

Jes. La kultura revolucio ruinigis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, faligis la "Ministerion de Higienaj Aferoj por Urbaj Sinjoroj". Tion ĝoje jubilas la proletaro kaj centmilionoj da revoluciaj popolanoj, sed por la enpartia burĝaro, tio estas peza bato, tial kompreneble ĝi malamegas la revolucion kaj faras reatakon kiam prezentiĝas ŝanco. Batalo estas neevitebla.

Antaŭe la malnova Ministerio de Higienaj Aferoj uzis grandan kvanton da homaj kaj materiaj fortoj kaj monrimedoj por servi al malmultaj homoj en la urboj. Nun dank' al la higiena revolucio la gravita punkto de la medicina kaj higiena laboro estas transmetita al la kamparo kaj la higienaj laborantoj persistas en servado al la plejmulto. Tio helpas al reduktado de la diferenco inter la urbo kaj la kamparo, al limigo de la burĝaj rajtoj kaj al forigo de grundo generanta kapitalismon kaj burĝaron. Tio nature tuŝis la akiritajn interesojn de la en- kaj eksterpartia burĝaro. La plej granda enpartia pentorifuzanta potenctenanto iranta la kapitalisman vojon Deng Hiaŭping la unua ekblovis la dekstran deviaciisman venton celantan renversi la ĝustajn verdiktojn. Akompanante lian tonon, la blovantoj de dekstra deviaciisma vento en la higienaj rondoj diris absurde, ke "en la pasintaj 25 jaroj" "oni plenumis ĝustan linion" kaj "akiris grandajn sukcesojn", kaj "ankaŭ la higiena fronto devas esti tiel taksata". Kaj samtempe ili energie atakis kaj kalumniis la novajn aferojn nudpiedajn kuracistojn kaj kooperan kuracan sistemon. Unuvorte, ili volis renversi la verdikton pri la "Ministerio de Higienaj Aferoj por Urbaj Sinjoroj" kaj intencis ree elmeti la reviziismaĵojn kritikitajn de la amasoj.

La aktivadoj de Deng Hiaŭping por renversi la ĝustajn verdiktojn kaj restaŭri kapitalismon ege indignigis la medicinajn laborantojn kaj revoluciajn amasojn. Prenante klasbatalon kiel ĉefĉeneron ili aktive sin ĵetis en la batalon kontraŭ la dekstra deviaciisma vento celanta renversi la ĝustajn verdiktojn, forte kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Deng Hiaŭping, kritikis lian krimon subfosi la higienan revolucion kaj renversi la ĝustan verdikton pri la "Ministerio de Higienaj Aferoj por Urbaj Sinjoroj", kaj rezolute defendis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj la venkajn fruktojn de la kultura revolucio. Ili firme decidis unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ, konduki la batalon ĝis la fino kaj gajni novajn venkojn en la higiena revolucio.

# Organiziĝo por likvidi malsanojn

— Pri la koopera kuraca sistemo de Lejuan-komunumo

**de RAPORTISTOJ de E P Ĉ**

EN la fajre ruĝa majo ni venis al Lejuan-komunumo en montregiono de la okcidenta parto de Hubej-provinco en centra Ĉinio.

Tiutage, kiam ni surpaŝis la limon de Lejuan laŭ zigzaga montvojo, subite aŭdiĝis sur rokmuro arĝenta sonoro de popolkanto:

*La koopera kuraca sistemo estas bela floro*
*de Prezidanto Maŭ persone kulturita kun favoro.*
*Ĝi kreskas kun fortikaj branĉoj sur rokmuro*
*dank' al printempa pluvo de l' kultur-revolucio;*
*radikas ĝi profunde en la koro de l' popolo.*

Pli kaj pli laŭtiĝis la kanto plena je profunda amo de la popolo de la montregiono.

Lejuan estas unu el la lokoj kie unue aperis la koopera kuraca sistemo en Ĉinio. Antaŭ dek jaroj, kiam aperis la ĝermo de tiu nova socialisma afero, ĝi tuj ricevis varman subtenon de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio. Nun ĝi jam floris, fruktis kaj montris sian fortan vivipovon en la vasta kamparo de Ĉinio.

Kiel elvolviĝis tiu nova kuraca sistemo? Kian batalon ĝi trapasis kaj kian rolon ĝi ludis? Ĉi

*Nudpieda Kuracistino kaj gekomunumanoj ripozas surkampe.*




sube ni prezentos al la legantoj kion ni aŭdis kaj vidis en tiu loko.

## PREVENTI KAJ KURACI MALSANOJN PER KOLEKTIVAJ FORTOJ

La popolo de Lejuan, kiu multe suferis de manko de kuracistoj kaj medikamentoj, profunde amas la kooperan kuracan sistemon, kaj kiam ili laŭdas tiun sistemon, ili nature ekmemoras pri la suferplena pasinteco. Iu maljuna malriĉkamparano diris al ni, ke antaŭ la Liberiĝo Lejuan ja estis surtera infero. Tiam la laboranta popolo estis barbare subpremata en politiko kaj kruele ekspluatata en ekonomio, suferadis de malsato kaj malvarmo en la tuta jaro kaj epidemioj furiozadis inter ili. Malsanetoj ilin turmentadis kaj gravaj malsanoj facile forrabis ilian vivon.

Lejuan situas en montaro meznombre je 1,100 metroj super la mara nivelo, kie la popolanoj loĝis dise kaj la trafiko estis tre malfacila. Tiam troviĝis en ĝi nur du bienulaj "kuracistoj". Por akiri ilian kuracon, oni devis ilin venigi per palankeno, pagi altan honorarion kaj ilin regali per bela manĝo. Ja estis neeble por la malriĉuloj plenumi tiajn postulojn! En 1948 okazis gripo. En 7 tagoj 5 el la 11 familianoj de malriĉkamparano Tan Maŭhiu trafis morton. Pro epidemiaj atakoj, nur 5 el la 22 familioj de iu vilaĝo postvivis ĝis la Liberiĝo. En tiu tempo, ĉiutage aldo niĝis novaj tomboj kaj ĉie aŭdiĝis ploroj.

*Malriĉkamparano Pan Kjuanming, kiu paraliziĝis 20 jarojn, nun aktive partoprenas en kolektiva laboro post resaniĝo.*



En 1949 Lejuan liberiĝis! Sub la gvido de l: Kompartio kaj Prezidanto Maŭ, la popolo d: Lejuan stariĝis en politiko kaj ekonomio kaj ion pliboniĝis ankaŭ la kuraca kondiĉo. Post l: popolkomunumigo en 1958 fondiĝis tie kuracejo Sed sub la influo de la reviziisma higiena linic antaŭenpuŝata de Liu Ŝaŭki, tiu kuracejo fariĝis en 1961 privata kuracejo, kiu mem respondecis pri siaj profito kaj perdo. La kuracistoj zorgis ne pri la interesoj de la amasoj, sed nur pri akiro de mono per kuracado kaj flanken ĵetis la laboron de preventado kontraŭ malsanoj. En 1965 la supera instanco liveris vakcinon al la kuracejo, sed ĝi ne ĝustatempe injektis ĝin al la popolanoj kaj du trionoj de ĝi fariĝis neuzeblaj pro paso de limdato. En la sekvanta printempo pluraj epidemioj okazis samtempe, kvarono de la loĝantoj de la komunumo malsaniĝis kaj tio donis tre malbonan influon al la agrikultura produkto kaj la sano de la popolanoj. Iuj kuracistoj ne zorgis pri ekonomia malfacilo de la pacientoj, laŭvole preskribis multekostajn medikamentojn, postulis altan honorarion kaj eĉ altigis la kostojn de medikamentoj. Tiu kuracejo eĉ difinis en sia regularo, ke la honorario por vizito al paciento devas esti kalkulita laŭ la distanco, kaj krome duobligita je okazo de nokta vizito. Popolamasoj diris indigne: "La kuracistoj havas orajn piedojn kaj oni devas pagi al ili por ĉiu paŝo!" La reviziisma linio de Liu Ŝaŭki turnis la rilaton inter la kuracistoj kaj pacientoj en puran rilaton de mono.

En 1966 ektondris la Granda Proleta Kultura Revolucio, kaj en la izola montvilaĝo ekflamis la fajrego de revolucia kritikado. Foje kaj refoje la amasoj studis la "Rezolucion de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio pri la Granda Proleta Kultura Revolucio", ellaboritan sub direktado de Prezidanto Maŭ. Tiu rezolucio montras, ke ĉiuj superstrukturo nekonformaj al la ekonomia baz

de socialismo devas esti reformitaj por firmigi kaj disvolvi la socialisman sistemon. En ligo kun la manko de kuracistoj kaj medikamentoj en la kamparo, la revoluciaj amasoj kondamnis kaj kritikis la krimon de la reviziisma linio.

"La malnova sistemo de medicina laboro nepre devas esti frakasita!" Potencaj voĉoj de la amaso skuadis la montvalon.

Sed kiamaniere reformi la malnovan sistemon? La partia komitato de la komunumo firme kredis, ke la amasoj estas veraj herooj kaj ili povos krei novan sistemon por anstataŭi la malnovan, do ĝi senskrupule kuraĝigis la amasojn por krei novan.

Kuracisto Tan Hiangguan, kiu jus finstudis la kurson de ĉina medicino de la gubernio, pensis pli multe pri tiu demando. Tiu juna kompartiano estas antaŭiranto sur la vojo de kolektivigo en Dugia-vilaĝo. Li retrorigardis la vojon trairitan en la lastaj jaroj: En la komenca periodo post la Liberiĝo, ili fondis kreditan kooperativon kaj vendan-aĉetan kooperativon, kaj per tio liberigis la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn el la ekspluatado de uzuristoj kaj fikomercistoj; ili organizis sin en agrikulturaj produktaj kooperativoj, kaj per tio liberigis sin de la minaco de naturaj katastrofoj kaj homfaritaj malfeliĉoj kaj evitigis dupolusiĝon al la kamparanoj. Kial ili ne povas sin organizi por batali kontraŭ malsanoj per kolektivaj fortoj, havante jam la ankoraŭ pli potencan kolektivon de popola komunumo kiel apoganton? Li kredis, ke ĉia malfacilo estas venkebla per la kolektiva forto de miloj kaj miloj da homoj. Li proponis al la partia filio de la brigado, ke la komunumanoj starigu fonduson por fondi kuracejon kaj li volonte laboros kiel ĝia kuracisto ne postulanta salajron sed nur ricevanta laborpoentojn kiel la aliaj komunumanoj.

Lia propono estis aprobita de la partia filio kaj propagandita inter la amasoj. La konkreta enhavo de la propono estis jena: kolekti sumon da mono de la komunumanoj kaj preni parton el la komuna bonstatiga fonduso de la produktaj taĉmentoj por starigi kuracejon de la produkta



*Nudpieda kuracisto Tan Hiangguan*

brigado; instali Tan Hiangguan kiel ĝian kuraciston, kiu ricevos laborpoentojn por sia servo same kiel aliaj komunumanoj. Por ricevi kuracon, la komunumanoj ĉiufoje pagos nur kvin cendojn por registrado kaj ne bezonos pagi por la kuracado, medikamentoj ktp. Tia sistemo ricevis varman subtenon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj en malpli ol tri tagoj oni jam sukcesis kolekti fonduson de pli ol 200 juanoj por koopera kuracado.

La novaĵo pri la fondo de koopera kuraca sistemo en la brigado de Dugia-vilaĝo rapide disvastiĝis tra Lejuan-komunumo. La partia komitato de la komunumo opiniis, ke tio estas kolektiva bonstatiga afero memvole iniciatita de la amasoj, la fonduso de koopera kuraco devenas de kaj estas uzata por la popolo, kaj tiu afero montris solidarecon de la laboranta popolo kaj konformas al la ekonomia politiko de la Partio por la kamparanoj de la nuna stadio. La partia komitato tuj donis varman subtenon al ĝi kaj decidis praktiki kooperan kuracadon en la tuta komunumo ekde januaro de 1967.

Praktiko de koopera kuracado en la kamparo estas profunda revolucio en la sfero de la super-

strukturo kaj ĝi neeviteble renkontis oponadon de la klasaj malamikoj kaj la malnovaj rutinaj fortoj. Iu kulako-ŝamano kaŝe disvastigis kalumnion, ke "la koopera kuraca sistemo postulas pagon de homo, kiu ne bezonas kuracon, tio vere estas ekspluato", kun la intenco agiti la komunumanojn retiriĝi el la koopera kuraca sistemo.

La partia komitato de la komunumo ĝustatempe movis la amasojn malkaŝi kaj kritiki la subfosadon de la klasa malamiko, kaj per tio edukis la amasojn kaj firmigis la kooperan kuracan sistemon.

Batalo ekzistis ankaŭ en la Partio. En konferenco pri higiena laboro okazigita en aprilo de 1968 en Jiĉang-subprovinco, al kiu apartenis Lejuan-komunumo, iuj ĉeestantoj montris malaprobon al la sperto de Lejuan. Al ili malplaĉis precipe la faroj por limigi burĝajn rajtojn, ke la medicinaj laborantoj de la koopera kuraca sistemo okupiĝas samtempe pri agrikultura produktado kaj pri kuracado kaj ricevas nur laborpoentojn.

Reprezentantoj de Lejuan-komunumo ĉeestantaj la konferencon refutis per faktoj la absurdajn opiniojn. Ili diris, ke la sorto de la du infanoj de malriĉkamparano Liu Daŭĉun povas bone pruvi, ĉu la sperto de Lejuan-komunumo estas bona aŭ ne. Antaŭ la starigo de la koopera kuraca sistemo, fileto de Liu Daŭĉun estis trafita de akuta malsano. Por lin kuraci, Liu Daŭĉun foruzis sian monon kaj prunteprenis monon de la kredita kooperativo, sed ne povis savi la knabon de morto. Post la fondo de la koopera kuraca sistemo, lia filineto trafis la saman akutan malsanon, sed dank' al ĝustatempa kuraco ŝi estis savita, kaj Liu Daŭĉun pagis nur kelkdek cendojn por registrado.

Post kiam la amasoj informiĝis pri la batalo en la konferenco, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de kelkaj brigadoj tuj pagis antaŭtempe por la fonduso de la sekvanta jaro, por montri sian firman decidon bone daŭrigi la kooperan kuracan sistemon.

Kiam iris intensa batalo inter la du malsamaj opinioj pri la koopera kuraca sistemo, Prezidanto Maŭ konsentis en decembro de 1968 publikigi la enketan raporton pri Lejuan-komunumo "La Koopera Kuraca Sistemo tre Bonvenigata de la Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj". Okaze de la publikigo, la redakcio de la *Popola Ĵurnalo* notis: "La koopera kuraca sistemo estas nova afero aperinta en la Granda Proleta Kultura Revolucio."

Kiam la amasoj de Lejuan informiĝis pri tio, ili tondre aklamis. Tuŝite ĝis larmoj kadroj kaj komunumanoj diris: "Prezidanto Maŭ plej bone komprenas la koran deziron de ni montanoj, li interligiĝas kun ni koro kun koro!"

## FONDI APOTEKON EN PRODUKTA TAĈMENTO

En septembro de 1970, kiam estis rikolta sezono de drogherboj, Tan Hiangguan kaj la sanitaraj laborantoj de Dugia-vilaĝo iris sur monton



*Taĉmenta apoteko*

por kolekti drogherbojn. Ili pleniĝis de ĝojo, vidante ke tie abundas je diversaj drogherboj. Kiam oni ĝoje diskutis kiamaniere utiligi la drogherbojn, Tan Hiangguan diris: "En nia montregiono estas multe da drogherboj. Se ni starigos apotekon en nia produkta taĉmento, la komunumanoj ne bezonas iri malproksime por akiri medikamenton kaj krome ili ne bezonos pagi por la drogherboj. Ĉu vi aprobas mian opinion?" La sanitaraj laborantoj opiniis, ke tio estas bona ideo, kaj proponis tuj ekfari tion. Reveninte al la vilaĝo, Tan Hiangguan kaj aliaj diris tion al la ceteraj kaj tuj ricevis ilian varman subtenon. Kaj tiamaniere fondiĝis la unua apoteko de Lejuan-komunumo ĉe la kvina produkta taĉmento en Dugia-vilaĝo.

Kvazaŭ en festotago, komunumanoj kaj kadroj amase venis al la apoteko por donaci al ĝi drogherbojn kaj helpi en aranĝado. Pli kaj pli multe da drogherboj estis alportitaj kaj ĉiuj korboj estis plenigitaj. "Mi havas ne uzatan ŝrankon en la hejmo kaj mi ĝin alportos por enteni drogherbojn." Iu maljuna malriĉkamparano rimarkis, ke al la apoteko mankas iloj por prilabori la drogherbojn, li do alportis pistilon, tranĉilon kaj muelilon de sia domo. Iu maljunulino eklarmis pro ĝojo je vido de tio kaj petis sian edzon alporti ŝian dotan kestegon por ĝin prunti al la apoteko. Veterana kulturisto de drogherboj Kang Hiangnian proponis al la taĉmentestro, ke oni starigu drogherban ĝardenon, kaj poste li transplantis en ĝin dekojn da specoj de drogherboj, kiujn li alportis de aliaj lokoj. Dank' al kuna klopodado de la amasoj, fondiĝis la apoteko tute sen elspezo.

Lejuan-komunumo havas 18 brigadojn, el kiuj ĉiu okupas meznombre terenon de pli ol 70 kvadrataj kilometroj, kaj ĝiaj membroj loĝas dise. Post la starigo de la koopera kuraca sistemo, ĉiu brigado havas sian kuracejon kaj la dislokiĝo de la kuracaj servejoj pliraciiĝis, sed tio ankoraŭ ne povis plenumi la bezonon por protekti la sanon de la amasoj. Tial la fondo de tiaj apotekoj alportis novan oportunon al la amasoj.

La partia komitato de la komunumo varme subtenis la iniciatemon de la amasoj kaj tuj okazigis kunvenon ĉe tiu loko por disvastigi la



*Porti preventan medikamenton al kamprando*

sperton. Nelonge post tio ĉiu el la 153 produktaj taĉmentoj de la tuta komunumo fondis sian apotekon per siaj propraj fortoj. Nun la antaŭaj sanitaraj laborantoj de la produktaj taĉmentoj jam ellernis la arton kuraci oftajn kaj ripetiĝemajn malsanojn per drogherboj kaj tradiciaj kuracmetodoj de sia loko. Ili laboras kune kun aliaj komunumanoj tage kaj plenumas servon de preventado kaj kuracado de malsanoj matene aŭ vespere.

Ni vizitis kelkajn tiajn apotekojn. Ili havas po ĉ. 2 cent specojn de drogherboj kaj iuj el ili eĉ pli ol 3 cent specojn. Nudpiedaj kuracistoj diris al ni, ke la preparitaj medikamentoj estis faritaj de ili mem kaj plejparto de la drogherboj estis kolektitaj aŭ kulturitaj de ili, dum la cetera parto estis donacita de la amasoj. Ĉiujare la taĉmento faras unufojan kolektivan kolektadon de drogherboj, kaj en ordinara tempo, kiam ko-

munumanoj irantaj al kamplaboro aŭ lernantoj survoje al lernejo trovas drogherbojn, ili kolektas kaj portas ilin al la apoteko, kiu postulas nenian pagon de la komunumanoj-pacientoj. Kiam kuracistoj de la komunuma hospitalo aŭ nudpiedaj kuracistoj de brigado faras rondiran kuracadon, ili ne bezonas kunporti multajn medikamentojn, ĉar oni povas ĉeloke akiri medikamentojn laŭ la receptoj faritaj de ili. La lokaj apotekoj kaj donas oportunan servon al la amasoj kaj ŝparigas al la taĉmento elspezon el la kuraca fonduso, por ebligi kuracon al pacientoj kun gravaj malsanoj. En la lastaj jaroj, la tuta elspezo por la pacientoj kiujn la komunumo transsendis al hospitaloj de superaj niveloj estis pagita el la fonduso de koopera kuracado kaj 20 el la pacientoj uzis po pli ol ducent juanojn. La komunumanoj ne plu bezonas prunti monon por kuraci siajn malsanojn, kaj la klasa solidareco inter la komunumanoj estis disvolvita.

## KURACISTOJ KIUJ DORSE PORTAS PACIENTON

Ne longe post nia alveno al Lejuan-komunumo, ni aŭdis jenan rakonton: En profunda nokto, infano de iu komunumano trafis akutan malsanon. La komunumano kriis por helpo sur montodeklivo, kaj tri kuracistoj venis al li unu post alia. Ili kune ekzamenis la infanon kaj konstatis, ke ĝi suferas de pulmito. Ili tuj donis helpon kaj ĝin flegadis dum la tuta nokto. En la mateno de la sekvanta tago la sanstato de la infano iom boniĝis kaj la kuracistoj foriris por labori surkampe. Por plue observi la infanon de tempo al tempo, unu el ili laboris proksime de la domo de la infano.

La nudpiedaj kuracistoj estas elektitaj de la amasoj. Kiel en tago tiel en nokto, ĉu en pluvo aŭ en vento, ili iras kun medikamenta kesteto al paciento tuj post voko, kiel ajn altan monton ili devas transgrimpi kaj kiom ajn longan vojon ili devas piediri. Tia zorgema kaj respondecema medicina servo estis neimagebla en la profunda montregiono antaŭ la starigo de la koopera kuraca sistemo.

Respondeculo de la komunumo diris al ni, ke antaŭ la kultura revolucio en la komunumo troviĝis nur 32 kuracistoj, sed nun jam 405, kiuj laboras en la komunuma hospitalo, la brigadaj kuracejoj kaj la apotekoj de la taĉmentoj. Meznombre ĉiu deknaŭo da familioj havas unu medicinservan punkton kaj ĉiu 37-o da homoj havas inter si unu kuraciston. El la medicinaj laborantoj 365 estas nudpiedaj kuracistoj, kaj Tan Hiangguan estas elstara ekzemplo. Li iniciatis la kooperan kuracan sistemon kaj la fondon de taĉmenta apoteko kaj tutkore laboras por preventi kaj kuraci malsanojn por la amasoj. Post kiam li estis elektita kiel vicprezidanto de la revolucia komitato de la komunumo, membro de la konstanta komitato de la partia komitato de Ĉangjang-gubernio kaj tiu de la partia komitato de Jiĉang-subprovinco, li ankoraŭ ĉiam konservas la naturon de nudpieda kuracisto. Lia tasko en la revolucia komitato estas zorgi pri kulturado de medicinaj laborantoj. Li multe atentas pri farado de eduko pri klasbatalo kaj batalo inter la du linioj al la medicinaj laborantoj, kaj regule invitas reprezentantojn de la amasoj por kritiki kaj kontroli iliajn laborojn, por ke ili senĉese eliminu siajn difektojn kaj progresadu. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĝoje diris, ke tiajn kuracistojn ili povas direkti, uzi kaj kredi. Sub la edukado de Tan Hiangguan per vortoj kaj modela agado, vicaro de novtipaj kuracistoj elkreskiĝis.

"Sed tiajn nudpiedajn kuracistojn kore bonvenigatajn de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj Deng Hiaŭping, la plej granda enpartia pentorifuzanta potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, atakis kun fermitaj okuloj antaŭ la faktoj kalumniante, ke ili 'havas malmulte da scioj' kaj 'estas en tre malalta nivelo'. Tio nur malkaŝis al ni, ke li tenas starpunkton kontraŭ la popolamasoj." La vortoj de iu respondeculo de la popola komunumo diritaj en iu kunsido estas vere pensigaj. Li diris al ni, ke la nudpiedaj kuracistoj naskiĝis kaj vivas en la loko, bone konas la sanstaton de la samlokanoj kaj la lokajn drogherbojn taŭgajn por kuraci iajn malsanojn kaj doni necesajn medicinajn helpojn al la malsanaj komunumanoj. Pli grave estas, ke ili estas ligitaj kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj koron kun koro. Tan Hiangguan kuracis komunumaninon, kiu suferis

dum 13 jaroj ripetiĝeman neŭriton, kaj per pli-ol-70-foja kuracado en iom pli ol du monatoj sukcesis rehavigi al ŝi laborkapablon. Nudpieda kuracisto Kian Given ne nur ellernis terapiojn de la ĉina kaj okcidenta medicinoj por kuraci oftajn kaj ripetiĝemajn malsanojn, sed ankaŭ sukcesis kuraci iujn malfacile kuraceblajn malsanojn. Li sukcesis resanigi pacienton suferintan de medolito, kuraci apendiciton per drogherboj kaj katarakton per popola recepto. En ĉio tio, studentoj diplomitaj en malnova medicina universitato ja ne povas esti kompareblaj al la nudpiedaj kuracistoj, kvankam ili studis medicinon 6 jarojn, tamen ili ne povis sendepende kuraci oftajn kaj ripetiĝemajn malsanojn kaj ne volis iri al la kamparo, al bazaj unuoj kaj al landlimaj regionoj por servi al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Ni decidis viziti Kian Given. En tiu tago li devis fari rondiran kuracadon al kelkaj produktaj taĉmentoj, do ni iris kune kun li. En ĉiu taĉmento, al kiu ni venis, oni varme salutis lin. Li preskribis medikamentojn por kelkaj komunumanoj. De kiam li fariĝis nudpieda kuracisto, li vizitis ĉiujn taĉmentojn de sia brigado kaj tre bone konas la sanstaton de la komunumanoj kaj iliajn familiojn. Kiam ni venis al familio loĝanta sur rokmuro, la mastro rakontis al ni jenan travivajon: En aŭtuno de 1973, lia plejaĝa nepo malsaniĝis, kaj lia dua nepo iris inviti kuraciston Kian. Sur la revena vojo, subite lia dua nepo sentis kapdoloron kaj vomis. Kian tuj faris al li akupunkturon por mildigi lian doloron kaj portis lin surdorse al lia hejmo. La mastro diris emocie, ke en la pasinteco kuracistoj estis ne venigeblaj al lia domo sur la rokmuro eĉ per portseĝo, sed nun kuracisto portas surdorse pacienton sur la rokmuron. Tio ja estas sukceso de la bona edukado de Prezidanto Maŭ!

Kaj iuj komunumanoj eĉ verkis popolkanton por laŭdi la kuracistojn:

*Ĉe Lejuan estas milo da montkrestoj,*
*sur kiuj vivas bonaj kuracistoj,*
*kiuj plenumas konscience servojn,*
*uzante arĝentpinglojn kaj drogherbojn.*
*Sur la piedoj ili pajlsandalojn portas,*
*sur korp' ilia kotmakuloj multas.*
*En pluvo kaj en vent', en tag' kaj en nokthoro,*
*sur suda mont' kaj norda monto ili kun fervoro*
*protektas sanon de l' popolo.*

La koopera kuraca sistemo ankaŭ ŝanĝas la pensojn de la malnovaj medicinaj laborantoj.

Kirurgo Aj Ŝoŭkun diplomita el malnova lernejo venis al Lejuan por ricevi reedukon, kaj post hardado li decidis fikse loĝadi en la kamparo kaj servi al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj dum sia tuta vivo. En la lastaj jaroj, li senĉese resumis sian sperton en praktikado kaj progresadis kaj nun jam povas fari ordinarajn operaciojn al malsupra abdomeno inkluzive de cezara operacio kaj preskribi drogherbojn laŭ ĉina medicino. Antaŭ nelonge li glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj nun laboras kiel vicestro de la komunuma hospitalo.



*La brigado periode publikigas konton pri kuraca spezo al komunumanoj.*

66-jara veterana ĉinmedicina kuracisto Hju Moŭŝu ofte kuracis malsanajn malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn en ilia hejmo. Se oni volas ion donaci por danki lin, li diris: "Mi ne plu estas la antaŭa Hju Moŭŝu. Antaŭe mi kuracis por gajni monon, sed nun mi tion faras por la revolucio. Mi tre ĝojas, ke mi povas servi al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj."

Kiel profundan ŝanĝon la higiena revolucio alportis al la rilatoj inter la homoj!

## PREVENTADO DE MALSANOJ

Veninte en la vilaĝojn de Lejuan, oni tuj estas frape impresitaj de la pura medio kaj la viveco de la komunumanoj. Ĉiuj domoj kaj staloj estas zorge purigitaj kaj sur la pordo de multaj domoj vidiĝas slipo kun la surskribo "Purega". La montvilaĝoj tute ŝanĝis la antaŭan neglektemon pri higieno postlasitan de la malnova socio.

Ŝanĝi la malbonan kutimon de neglekto pri higieno estas profunda revolucio en ideologio. En tiu revolucio en la kamparo la nudpiedaj kuracistoj estas trupo de freŝaj fortoj. Plenumante kuracadon al la amasoj, ili propagandas la principon "preni preventadon kiel la ĉefan rimedon" kaj sciojn pri higieno. En la elementaj kaj mezgradaj lernejoj de Lejuan-komunumo, lecionoj pri higieno estas instruataj de nudpiedaj kuracistoj de la brigadoj. Kaj krome la produktaj taĉmentoj ankaŭ elkulturis pli ol 530 familiajn sanitaristojn per kursoj aŭ individua instruado. En iu produkta taĉmento konsistanta nur el 12 familioj troviĝas 13 komunumanoj, kiuj ellernis akupunkturon, kaj 19 komunumanoj kiuj povas kuraci oftajn malsanojn per drogherboj.

De post la starigo de la koopera kuraca sistemo en Lejuan-komunumo, la medicinaj laborantoj de la komunuma hospitalo kaj la nudpiedaj kuracistoj de la produktaj brigadoj kaj taĉmentoj kune faris okfoje enketojn pri lokaj malsanoj, kronikaj malsanoj kaj virinaj malsanoj. Ili kuracis pli ol 3,000 homojn kaj resanigis pli ol 1,500 laborkapablulojn, kiuj nun povas partopreni en la amasa movado de lernado de DAĝaj en agrikulturo. En la malnova socio, malriĉkamparano Pan Kjuanming sin kaŝadis en malhela humida kaverno por eviti perfortan rekrutadon kaj pro tio lia dekstra gambo suferis medoliton. Post la Liberiĝo, li kuracigis sin en diversaj lokoj kaj elspezis pli ol 700 juanojn, sed anstataŭ resaniĝi liaj gamboj paraliziĝis. En 1969, kiam kuraca taĉmento de ĈPLA kun lokaj nudpiedaj kuracistoj faris enketon kaj kuracadon de malsanoj, li estis venigita al la kuracejo de la brigado kaj post pli-ol-du-monata kuracado li jam denove stariĝis kaj fariĝis taĉmentestro.

La nudpiedaj kuracistoj injektas kaj disdonas porpreventajn medikamentojn antaŭ apero de sezonaj epidemioj. En periodo plenplena de urĝaj kamplaboroj, ili sendas medikamentojn al la kampoj kaj en ordinara tempo ili sendas medikamentojn al ĉiu domo. Ankaŭ la medicinaj laborantoj de la komunuma hospitalo faras aktivan preventadon kaj ĝustatempan kuracadon de malsanoj. Kontraŭmalsana vakcino povas esti ĝenerale injektita al la pli ol 15,000 membroj de la tuta komunumo en iom pli ol unu tago, tial epidemioj povas esti efike briditaj kaj la sano de la amasoj estas bone protektata. Anstataŭ 70 pocentoj antaŭ la starigo de la koopera kuraca sistemo nun 97 pocentoj de la laborkapabluloj povas partopreni en produkta laboro kaj tio forte akcelas la agrikulturan produktadon. En la lastaj jaroj, oni plenumis kvaroble tiom da laboroj por bonigo de kampoj kaj akvoutiliga konstruado, kiom oni faris dum la 17 jaroj antaŭ la kultura revolucio. La komunumo starigis staciojn de agrikulturaj maŝinoj kaj hidroelektrejojn kaj ĝia produktokvanto de greno kreskas ĉiujare.

La popolo de Lejuan-komunumo tamen ne kontentiĝis je la atingoj. Antaŭ nelonge ili ellaboris novajn planojn pri lernado de Daĝaj en agrikulturo kaj higiena revolucio. Ili interligas la plenumon de sia plano kun la firmigo de la diktaturo de la proletaro kaj efektivigo de la granda celo de komunismo, kaj solide faras konkretajn laborojn.

Kiam ni finis la vizitadon kaj iris returne sur montvojo, ni aŭdis popolkantojn en la valoj, kiuj sentigis al nia koro bedaŭron de adiaŭo, kaj aperis denove antaŭ niaj okuloj senafektaj ridetantaj sanaj vizaĝoj de komunumanoj.

# Bona estas la koopera kuraca sistemo

— Rakontita de maljuna malriĉkamparano

Mi elkore aplaŭdas la kooperan kuracan sistemon. Tio estas bona rimedo por venki malsanon, alprenata de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sub la gvido de Prezidanto Maŭ, post kiam ni liberigis nin de mizereco. Kian bonon ĝi alportas al ni? Pri tio mi devas rakonti komence de mia familio.

Mi estas nomata Kian Hingŝu kaj 67-jara ĉijare. En la malnova socio mi pasigis duonon de la vivo kaj propraokule vidis ke la vivo de multaj malriĉuloj estis forrabita de malsanoj pro manko de mono por viziti kuracistojn kaj aĉeti medikamenton en tiu damninda socio. Miaj gepatroj ĝuste pro tio mortis. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, ni fariĝis la mastroj de la ŝtato kaj ekhavis feliĉan vivon. Sed antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ankoraŭ ne povis ricevi kurachelpon pro



*La familio de Kian Hingŝu*

ĝenado de la kontraŭrevolucia reviziisma higiena linio antaŭenpuŝata de Liu Ŝaŭki.

En la jaro 1965, mia filo suferis gravan malsanon. Kaj tiutempe li estis ne kuracebla en nia montregiono, tial mi ricevis 80 juanojn de la produkta taĉmento kaj kune kun kelkaj komunumanoj portis lin al Jiĉang-hospitalo, irinte pli ol 120 kilometrojn trans montoj en 4 tagoj. Mi pensis en mi, ke mia filo estos savita. Sed estis neatendite, ke laŭ la regularo de la hospitalo oni devas unufoje antaŭpagi 200 juanojn por la enhospitaliĝo. Pri tio mi interkonsiliĝis kun respondeculo de la hospitalo, sed la lasta diris al mi ke tio estas la regularo difinita de supera instanco kaj neniom ŝanĝebla. Tiam mia espero falis en abismon. Mia filo diris al mi kun larmoj: "Ni foriru, paĉjo, ĉar ĉi tiu hospitalo ne estas de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj!" Kelkajn tagojn post la reveno al la hejmo mia filo mortis. Tiutempe ekaperis en mia kapo la demando nesolvebla: Kial la hospitalo de la popolo ne donas kuracservon al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj? Kiu "supera instanco" kunpremas al ni la gorĝon?

Komenciĝis la Granda Proleta Kultura Revolucio. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj medicinaj laborantoj forte kritikis la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki. Jen mia demando estis solvita. La tiel nomata "supera instanco" estis neniu alia ol Liu Ŝaŭki, kiu malhelpis plenumon de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj turnis la urbajn hospitalojn en sinjorajn hospitalojn. En iu amasa kritika kunveno mi kaj miaj familianoj kondamnis la krimojn de lia reviziisma higiena linio.

Prezidanto Maŭ faris la instrukcion **"Meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon".** Prezidanto Maŭ plej bone konas, kion pensas ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En printempo de 1967 nia komunumo efektivigis la kooperan kuracadon kaj elkulturis nombron da nudpiedaj kuracistoj. En 1970, la produkta taĉmento starigis sian apotekon. Ĉio ĉi tio ŝanĝis iom post iom la staton de manko de kuracistoj kaj medikamentoj en la montregiono. En la lastaj jaroj, 4 el miaj familianoj suferis gravan malsanon. Iujare mia nepo suferis de medolito kaj la tuta familio timis ke li paraliziĝos. Informiĝinte pri tio, la kuracistoj tuj venis por kune fari diagnozadon. Malgraŭ malpuro de sangopuso ili zorgeme faris operacion, ŝmiris medikamenton kaj bandaĝis por mia nepo. Kiam li kuŝis en la hejmo, la kuracistoj ĉiutage iris 4-kilometran montvojon al ni por doni al li la kuracservon. Dank' al la bona flegado de la kuracistoj, mia nepo rapide resaniĝis. Iufoje mi rompiĝis je kruro dum hakado de brullignaĵoj sur la monto. Informiĝinte pri tio, kelkaj kuracistoj rapidis por fari zorgeman ekzamenadon kaj ŝmiri medikamenton al mi. Tiutempe mi ne sciis kion diri kaj foje-refoje dankis ilin. Kaj la kuracistoj diris al mi: "Mortis via filo, vi tamen prenu nin kiel viajn filojn, kaj ni nepre resanigos vin!" Aŭdinte tion mi estis kortuŝita ĝis larmoj. Mi sentis profunde, ke grandaj estas la ĉielo kaj la tero, sed ne tiom kiom la bonfaro de la Partio, kaj profundaj estas la maroj, sed ne tiom kiom la klasa amo. Dank' al la bona kuracado kaj flegado de la medicinaj laborantoj mi rapide resaniĝis. Poste mi dankis la kuracistojn, sed ili diris al mi: "Vi devas danki Prezidanton Maŭ, ĉar ni faris nur tion, kion ni devis fari laŭ lia revolucia higiena linio." Jes, ili prave diris. Estas la koopera kuracado, kiu resanigis miajn familianojn kaj estas la revolucia higiena linio de Prezidanto Maŭ, kiu savis la vivon de mia tuta familio. La du malsamaj linioj portis al ni la du tute malsamajn sortojn!

En la 7 familianoj, krom mia edzino kiu zorgas dommastrumadon kaj mia plej juna nepo kiu vizitas lernejon, la bofilino, la du pli grandaj nepoj kaj la nepino ĉiutage partoprenas en fizika laborado de la produkta taĉmento. Ni havas feliĉan vivon. En la lasta jaro mia nepino finis sian lernadon de la Medicina Instituto "la 7-a de Majo" kaj servas nun kiel nudpieda kuracistino de la produkta taĉmento. Mi postulas, ke ŝi tutanime servu al la popolo. En vakantaj parceloj ĉirkaŭ mia domo mi kulturas pli ol 20 specojn da drogherboj kaj post rikolto mi senpage donas ilin al la apoteko de nia produkta taĉmento. Por preventi kaj kuraci malsanon ankaŭ mia tuta familio iom kontribuas.

BAJ ŜAN:

# Li fariĝis labormodelo

ANTAŬ nelonge, dum mia vizito al Lejuan-komunumo, mi aŭdis multajn rakontojn laŭdantajn la kooperan kuracan sistemon, kaj unu el ili temas pri malsanulo kiu fariĝis labormodelo.

En la fino de la jaro 1973, la nomita komunumo okazigis kongreson de labormodeloj en konstruado de socialisma nova kamparo.

En la inaŭgura tago, kun ĝojo la labormodeloj venis en la kunvenejon. Apartan atenton altiris al si iu plenaĝulo en la ĉeestantoj. Iuj varme manpremis kun li kaj aliaj lin salutis. Kiam ili estis varme interparolantaj, la sekretario de la partia komitato de la komunumo suriris la podion kaj deklaris al ili: "Gekamaradoj, inter la ĉeestantoj de la kongreso, estas malnovaj modeloj multfoje elektitaj, viglecplenaj junuloj, kaj ankaŭ kamarado Ĝaŭ Dading, antaŭe malsanulo sed hodiaŭ labormodelo." Ektondris aplaŭdado kaj admiraj rigardoj direktiĝis al Ĝaŭ Dading.

Tiam, kamarado Ĝaŭ Dading sidanta inter la aliaj kunvenantoj estis forte kortuŝita kaj eklarmis. Kiom da vortoj li volas diri! Tamen, longtempe li povis diri nenion. Li stariĝis kaj profunde riverencis al la portreto de Prezidanto Maŭ super la podio.

Kamarado Ĝaŭ naskiĝis en malriĉkamparana familio en la jaro 1930, kaj kiam li estis 19-jara, Lejuan estis liberigita. Kun granda entuziasmo la junulo partoprenis en la movadoj de agrara reformo kaj agrikultura kooperativigo. En la jaroj de Antaŭensaltego, popolaj komunumoj fondiĝis en la profunda montregiono. Kaj tiam, li likvidis sian analfabetecon kaj unuafoje laŭdis Prezidanton Maŭ kaj la Kompartion per plumo. Tamen, post nelonge, en la sezono kiam ekverdis la salikoj kaj pompis floroj sur la montoj subite ekblovis "malvarma vento" de kalumnioj. Iuj diraĉis, ke "la popolaj komunumoj fondiĝis tro frue" kaj "fuŝe", kaj poste la kampoj, terkulturiloj kaj tirbestoj estis disdonitaj al ĉiuj familioj, kaj estis praktikataj la sistemo de "fikso de produkta kvanto bazita sur familia mastrumado" kaj la sistemo "premii pro superplenumo de produktoplano kaj kompensigi pro neatingo de planita produktokvanto". Ĉar malmultaj el lia granda familio estis laborkapablaj,

*Kamarado Ĝaŭ Dading*



kamarado Dading penlaboris tage kaj nokte surkampe por atingi la fiksitan produktokvanton. Pro penlaborado, li malsaniĝis je renito kaj artrito. Al la montregiono tiam mankis kuracistoj kaj medikamentoj. Kvankam li elspezis pli ol 300 juanojn por kuracado, tamen li ne resaniĝis. Post nelonge, aperis eksterordinara stato en lia korpo: li manĝis pli kaj pli multe, tamen lia forto senĉese malgrandiĝis. Li ne havis sufiĉan forton por labori, tamen povis manĝi kelkajn bovlojn da manĝaĵoj ĉiufoje. La kadroj kaj komunumanoj tre zorgis lian sanon, tamen ankaŭ estis malmultaj homoj, kiuj ne komprenis kamaradon Ĝaŭ Dading, misopiniis pri li kaj lin moknomis "Maldiligentulo". Tamen, kamarado Dading klare sciis, ke la sistemo "fikso de produkta kvanto bazita sur familia mastrumado" malsanigis lin. Li pensis: "La kamparo ne devas ĉiam malhavi kuracistojn kaj medikamentojn kaj mi Ĝaŭ Dading certe liberigos min de la kromnomo 'Maldiligentulo' en iu tago."

La Granda Proleta Kultura Revolucio flamis tra la tuta lando. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Lejuan-komunumo indigne kondamnis la krimojn de Liu Ŝaŭki en restaŭro de kapitalismo. Ĝaŭ Dading tiam komprenis, ke la ĉefkrimulo, kiu antaŭenpuŝis la sistemon de fikso de produktokvanto bazita sur familia mastrumado kaj la reviziisman linion, estis Liu Ŝaŭki. Li aktive kritikis Liu Ŝaŭki kune kun la aliaj komunumanoj.

En printempo de 1967, efektiviĝis la koopera kuraca sistemo en la komunumo. Tiam, Dading pensis: "Mi jam saviĝos!" Vere tiel okazis, dank' al zorga kuracado de nudpiedaj kuracistoj, lia kronika malsano tagon post tago kuraciĝis. Sed, ankoraŭ ne malgrandiĝis lia manĝkvanto kaj malrapide fortiĝis lia korpo. Kiam la nudpiedaj kuracistoj faris al ĉiuj vilaĝanoj ampleksan ekzamenon sub la helpo de kuraca taĉmento de ĈPLA, ili trovis, ke li suferis ankilostomozon, faris al li efikan kuracadon kaj rapide lin resanigis.

La rizidoj atakitaj de malvarmego plej multe ŝatas la varmon de sunlumo, kamarado Dading turmentita de malsano profunde sentas la superecon de la koopera kuraca sistemo. Li kore dankas la Partion kaj Prezidanton Maŭ pro la refoja savo de lia vivo. Li decidis dediĉi sian tutan forton al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

De tiam, li aktive laboras malgraŭ vento, pluvo, penigo kaj malpureco. Li ofte diris: "Tion faru mi!" Nelonge post la Printempa Festo de 1972, la komunumo alvokis konstrui ŝoseon, kamarado Dading stariĝis la unua kaj diris: "Tion faru mi!" Kaj en la sekvanta tago, t.e. je du tagoj antaŭ la fiksita dato, li iris al la konstruejo kaj eklaboregis kune kun alia ŝosekonstrua brigado. Alifoje, la produkta brigado bezonis fortajn komunumanojn por sendi generatoron pezan je 100 kilogramoj al najbara brigado. Tion aŭdinte kamarado Dading diris al la brigadestro: "Tion faru mi!" En la komenco, kvar homoj ĝin portis, sed poste, la vojo fariĝis tiel kruta, ke kvar homoj ne povis kune iri sur ĝi. Kion fari? "Mi provu!" Dading levis la generatoron sur la dorson kaj iris kun ĝi pli ol 1 kilometrojn je unu fojo. Ili fine ĝin portis al la celloko.

En la sekvanta jaro, kiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj elektis labormodelojn por ĉeesti la labormodelan kongreson, ili paroladis pri la ordinaraj sed kortuŝaj faroj de Dading dum tuta antaŭtagmezo kaj unuanime elektis lin kiel labormodelon de Kianĉajling-brigado.

Kiel estas kamarado Ĝaŭ Dading hodiaŭ? Mi trovis lin en profunda arboza montaro. Li estas ĉefa forta membro de la arbohaka grupo. Liaj kunbatalantoj diris al mi, ke Dading estas bona laboranto. En la lastaj du jaroj, li aktive kaj memkonscie laboris kaj bone plenumis siajn taskojn. Ĉiufoje kiam li reiris hejmen por pasigi libertempon, li senescepte revenis al la brigado unu tagon antaŭ la fiksita dato.

Kiel forta montano estas Ĝaŭ Dading, kiu sidis vizaĝe al mi! Kun sunbruna vizaĝo, dika kaj forta korpo, li diris al mi svingante siajn fortajn manojn: "Nun mi estas tute sana, kaj mi havas neelĉerpeblan forton por konstrui socialismon!"

# Kurantaj Aferoj

## FOTOGRAFILA INDUSTRIO EN DISVOLVO

La fotografila industrio de nia lando, fondita en la granda antaŭensalto de 1958, rapide disvolviĝis puŝate de la Granda Proleta Kultura Revolucio. En diversaj lokoj de la lando konstruiĝis nombro da specialaj fabrikoj kaj laborejoj por produkti fotografilojn. La produktokvanto de fotografiloj de la tuta lando en 1975 estis 13-oblo de tiu en 1965 kaj la specoj estis preskaŭ 5-oblo. Ankaŭ altklasaj kaj specialaj fotografiloj bezonataj de jurnalistoj kaj sciencesploraj fakoj jam estis sukcese provfaritaj kaj pogrande produktataj.




*Novaj fotiloj fabrikitaj post sukcesa provado*

Multaj altprecizaj kaj altefikaj specialaj ekipaĵoj estas sukcese provfaritaj kaj instalitaj por uzado. La malnova prilabora tekniko de lenso estas plejparte anstataŭita per nova kaj ankaŭ multaj novaj materialoj estas uzataj, kaj bona bazo estas metita por disvolviĝo de la fotografila produktado.

## NENLIN-FERVOJO MALFERMIĜIS AL TRAFIKO

Venke konstruiĝis kaj malfermiĝis al trafiko la nomita fervojo, kiu trairas praarbaran regionon de la Granda Hing-an-montaro en nord-orienta Ĉinio. Tiu speciala arbara fervojo havas tre gravan signifon por laŭplane ekspluati praarbarojn, interligi nordan limregionon de Ĉinio kun aliaj lokoj, akceli la grandan unuiĝon de la diversaj naciecoj kaj firmigi la nacidefendon de nia lando.

La praarbara regiono de la Granda Hing-an-montaro estas la plej granda verda trezorejo de nia lando kaj ankaŭ abundas je mineraloj sub la tero. Ĉar ĝi situas en frosta zono, ĝi restis longe ekster trafikado kaj ne ekspluatata. Post finkonstruo kaj ekfunkciado de la trunka kaj branĉaj linioj de Nenlin-fervojo aperis unu post alia novaj urboj kaj multaj ŝtataj kultivejoj ambaŭflanke de la fervojo. Dank' al ĝi



*Trajno kuras sur la Nenlin-a Fervojo.*

ĉiujare granda kvanto da ligno estas transportata al diversaj lokoj de la tuta lando kaj ankaŭ granda kvanto da kemisterko, insekticido, agrikulturaj maŝinoj kaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj estas transportata al la olunĉun-a, ovenke-a kaj dahura popoloj longe vivantaj en profundaj montoj kaj densaj arbaroj, kio akcelas la socialisman konstruadon kaj plibonigas la popolan vivon de la arbara regiono.


ZOŬ VEN:


# Trunka linio de mikroonda komuniko konstruita en Ĉinio

TRUNKA linio de mikroonda komuniko, kiu interligas Pekinon kun pli ol dudek provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta Ĉinio, estas konstruita. Tiu linio estas ekipita per 960-kanala transistora kaj 600-kanala elektronvalva mikroondaj signalsistemoj projektitaj kaj faritaj de Ĉinio en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Transsendado de televido, faksimiloj, telegramoj kaj telefonoj estas farata tra la nova telekomunika trunka linio inter multaj ĉefaj urboj de la bordo de la Orienta Ĉina Maro ĝis la nordokcidenta altebenaĵo kaj de Ĉangbaj-montaro en la Nordoriento ĝis la Perlorivero en suda Ĉinio.

La trunka linio konsistas el pluraj radiokanaloj. Ĉiu radiokanalo de unu signalsistemo havas 600 voĉkanalojn kaj tiu de la alia signalsistemo 960 voĉkanalojn, kaj ĉiu povas transsendi televidon. Nun la Pekina Televida Stacio povas transsendi per la mikroonda komunika sistemo koloran aŭ nigran-blankan televidon al stacioj en pli ol 20 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando. Loĝantoj de malproksimaj regionoj povas legi la Popolan Ĵurnalon de Pekino en la sama tago dank' al transsendo per altrapideca faksimila aparato tra tiu trunka linio. La finkonstruo de la linio de mikroonda komuniko havas gravan signifon por disvastigi Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson, fir-

*Kontrola ĉambro de la laborejo de mikroondaj ekipaĵoj*







*Altrapida faksimila aparato por transsendi jurnalojn*

migi la diktaturon de la proletaro kaj servi al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

La mikroonda komunikado de Ĉinio elvolviĝis en la intensa batalo inter la du linioj. En la fina periodo de la kvindekaj jaroj, kiam laborantoj de telekomunika fako komencis provfaradon de ekipajoj por mikroonda komuniko, mankis al ili teknikaj laborantoj kaj teknika materialo por referenco. Tiam multaj ŝlosilaj aparatoj kaj elementoj ankoraŭ estis neprodukteblaj en nia lando. Imperiistoj tenis la teknikon en sekreto kontraŭ nia lando kaj la sovetunia reviziisma renegata kliko detruis la interkonsentojn kaj revokis siajn specialistojn kun la vana espero malhelpi la ĉinan popolon en antaŭenmarŝo. Liu Ŝaŭki kaj liaj kunuloj plenenergie antaŭenpuŝis la kontraŭrevolucian reviziisman linion distrumpetante kompradoran filozofion kaj rampismon, kaj burĝaj reakciaj "aŭtoritatuloj" disblovis pesimismon. Sed la vastaj amasoj de PTT-laborantoj rezolute plenumis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, persistante en sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj kaj post klopodado dum malpli ol tri jaroj, ili jam sukcese elfaris kompleton de 600-kanalaj elektronvalvaj mikroondaj signalekipaĵoj. Per tio ili metis fundamenton por disvolvi mikroondan komunikadon en Ĉinio.

La Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio malfermis larĝan vojon por la disvolviĝo de mikroonda komuniko en Ĉinio. Inspirate de la instruo de Prezidanto Maŭ, ke **"la ĉina popolo havas altan aspiron kaj grandan kapablon kaj certe atingos kaj superos la avangardan nivelon de la mondo en nemalproksima estonteco"**, la PTT-laborantoj komencis en 1969 esplori por elfari 960-kanalan transistoran aparataron por mikroonda komuniko de pli altaj teknika nivelo kaj aŭtomateco. Samtempe kun tio, ili komencis grandskale konstrui trunkan linion de mikroonda komunikado. Dum la esplorado kaj konstruado en la pasintaj pli ol 6 jaroj, la PTT-laborantoj sub la gvidado de diversnivelaj partiaj komitatoj serioze studis verkojn de Marks, Engels, Le-



*Provi fotografan komunikadon per la mikroonda komunika trunklinio*

nin kaj Stalin kaj verkojn de Prezidanto Maŭ, profunde kritikis la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kaj la reviziismajn varojn kolportitajn de ili kiel kompradoran filozofion, rampismon kaj absurdajon "la superuloj estas geniaj kaj malsuperuloj stultaj", kaj pli altigis sian konscion pri la batalo inter la du klasoj kaj inter la du linioj kaj pri daŭrigo de la revolucio. Sub la helpo de unuoj de elektroniko, metalurgio, maŝinfarado kaj kemia industrio kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo, ili plene disvolvis aktivecon de laboristoj, kadroj kaj teknikistoj kaj tiun de la sciencaj institutoj, produktaj entreprenoj kaj uzantoj-unuoj kaj atingis novan nivelon kaj novan rapidecon en elfarado de aparatoj kaj konstruado de la linio.

Dum la konstruado de la trunka mikroonda komunika linio, la partiaj komitatoj kaj revoluciaj komitatoj de la koncernaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj plifortigis sian gvidon al la laboro. Ili persistis en teno de proleta politiko en komando kaj mobilizis la popolamasojn loĝantajn en la apudeco de la trunka linio al la konstruado. Ĉiuj partoprenantoj de tiu laboro sindone penlaboregis kun sentima revolucia spirito tiel en frosta vintro kiel en varmega somero.

Kun la disvolviĝo de la konstruado de mikroonda komunika linio, stariĝis kaj fortiĝis armeo de mikroondaj laborantoj kun alta politika konscio. La koncernaj unuoj de scienca esplorado, produktado, projektado, konstruado, instruado ktp. fondis "laboristajn kolegiojn de la 21-a de julio" kaj diversajn mallongajn kursojn kaj per ili altigis la politikan konscion kaj teknikan nivelon de la laboristoj kaj oficistoj strikte kombinante la lernadon kun la praktikado. La laboristoj de la mikroondaj relajsaj stacioj respondecantaj pri konservado de la linio bone laboras kaj senĉese altigas la komunikan kvaliton de la linio kaj garantias ĝian glatan funkciadon.

# Mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj de Guangdong-provinco


de LONG LIN

GUANGDONG en la suda parto de Ĉinio estas grava produktejo de greno kaj sukero kaj ankaŭ unu el la provincoj de nia lando, kiuj bone faras konstruadon de mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj. Antaŭ ne longe, ni vojaĝis pli ol 2,000 kilometrojn tra la provinco, de la okcidentaj ondiĝantaj montetoj ĝis la suda Delto de Perlo-rivero kaj de la orienta Ĉaŭŝan-ebenaĵo kun vasta rizkamparo ĝis la pitoreska Conghua-montregiono kun termofontoj. Tie ni vizitis dekojn da mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj, akvokonservejoj kaj irigaciaj konstruaĵoj kaj propraokule vidis la atingojn de la provinco en konstruado de tiuj elektrejoj post la Liberiĝo, precipe en la Granda Proleta Kultura Revolucio.

## ĈIE TROVIĜAS HIDROELEKTREJOJ EN LA PROVINCO

Post transgrimpo de montoj unu post alia ni per aŭto atingis iun montpiedon kaj vidis tie

*La konstruejo de Lejgongtan-hidroelektrejo de Tunĉang-gubernio*





*La Enĉeng-a Hidroelektrejo ĉe Gingiang-rivero*

bonorde viciĝantajn domojn. Jen estas Kingtong-a hidroelektrejo de Luoding-gubernio.

La skalo kaj ekipaĵoj de ĝi estas multe malpli grandaj ol tiuj de Hinfenggiang-a kaj aliaj grandaj hidroelektrejoj de la provinco. Sed ĝi estas relative granda por tiu izolita montregiono, kiu havis nenian elektrejon antaŭ la Liberiĝo. La totala kapacito de ĝiaj instalitaj generatoroj estas 4,800 kilovatoj. Ĝi kune kun aliaj malgrandaj hidroelektrejoj de la gubernio liveras elektroenergion al la loko por industria kaj agrikultura produktado kaj lumigado.

Ĉie vidiĝas tiaj elektrejoj en la tuta provinco. Plene utiligante montajn torentojn kaj fontojn kaj akvokonservejojn, la popolo loĝanta en montregiono de la norda Guangdong-provinco kaj la li-a, mjaŭ-a kaj han-a popoloj loĝantaj en Vuĝi-montaro de Hajnan-insulo starigis multajn elektrejojn. En Ĉaŭŝan-ebenaĵo kaj la Delto de Perlo-rivero oni funkciigas hidroelektrejojn konstruinte riverbarajojn por levi akvonivelon aŭ utiligante tajdon. En la fino de la lasta jaro la nombro de la mezaj kaj malgrandaj elektrejoj en la tuta provinco jam atingis pli ol 12,700, kaj la totala kapacito de iliaj instalitaj generatoroj jam superis 623,000 kilovatojn. Nun plejparto de la popolaj komunumoj de tiu provinco jam uzas elektron.

La konstruado de la mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj de Guangdong-provinco spegulas de unu flanko disvolviĝon de la elektra industrio de nia tuta lando. La nuna totala kvanto de la elektroprodukto de tiaj hidroelektrejoj de la lando en unu jaro superis tiun de la tutlanda elektra industrio antaŭvespere de la Liberiĝo. Tio plene montris grandan rolon de la mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj.

## GRANDAJ FORTOJ DE LA AMASOJ


En Ĉinio la ŝtato mem konstruas grandajn elektrejojn, kaj samtempe kuraĝigas kaj helpas guberniojn, komunumojn kaj produktajn briga-

dojn de diversaj regionoj konstrui mezajn kaj malgrandajn hidroelektrejojn. En la Granda Proleta Kultura Revolucio la popolo de Guangdong aktive disvolvas la movadon de lerno de Daĝaj en agrikulturo kaj multe entreprenas konstruadon de mezaj kaj malgrandaj elektrejoj.

La montaj regionoj konsistigas du trionojn de la areo de la provinco, kiu estas tre riĉa je akvofonto pro multeco de riveroj kaj abunda pluvo. Tamen, antaŭ la Liberiĝo la akvofonto ne estis utiligata kaj troviĝis nur unu hidroelektrejo kun 18 kilovatoj en la tuta provinco. Post la Liberiĝo, la popolo de Guangdong konstruis nombron da mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj. En la jaro 1958, sub la kuraĝigo de la ĝenerala linio de la Partio **"streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie"**, leviĝis en la tuta provinco alta tajdo de energia starigo de malgrandaj hidroelektrejoj. Sed sub la influo de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, iuj opiniis, ke malgrandaj hidroelektrejoj ne povis ludi grandan rolon kaj proponis starigi grandajn elektrejojn per monrimedo, ekipaĵoj kaj specialistoj liveritaj de la ŝtato. Rezulte de tio tre malrapide disvolviĝis la elektra industrio.

Post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio la amasoj de diversaj lokoj kritikis la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj levis novan tajdon konstrui mezajn kaj malgrandajn hidroelektrejojn per siaj propraj fortoj. Ĉar konstruado de malgrandaj hidroelektrejoj bezonas malmultan investon, mallongan tempon kaj nealtan teknikon, gubernioj, komunumoj kaj brigadoj povas funkciigi ilin kaj montris grandan aktivecon en la konstruado. Por solvi problemojn de manko de monrimedo, ekipaĵoj kaj teknikoj, la amasoj prezentis multajn bonajn ideojn. Tio plene manifestas kreivon de la popolo.

En 1969, kiam oni komencis konstrui Kintong-hidroelektrejon en Luoding-gubernio, pli ol 12,000 komunumanoj de la tuta gubernio partoprenis en ĝia konstruado. Ili alportis al la konstruejo siajn instrumentojn, mem konstruis provizorajn kabanojn kaj hakis monton por konstrui akvokonservejon. La laboristoj de la agrikultura fabriko de la gubernio fabrikis akvoturbinon por generatoro de 1,600 kilovatoj. La fabriko de cementaj preparaĵoj prove sukcesis fari altpremajn tubojn per ferbetono, kiujn oni uzas por anstataŭi altpremajn ŝtaltubojn, dank' al kio



*Hidroelektrejo sur la dua akvokonserva ŝtupo en Vuĝi-montaro de Conghua-gubernio*

ŝpariĝis granda monsumo por la tuta konstruaĵo. Nur en unu jaro la unua generatoro estis finkonstruita kaj komencis produktadon. Per la enspezo de la elektrejo oni plenumis konstruadon de la dua kaj tria generatoroj. Puŝate de la hidroelektrejo Kingtong la malgrandaj hidroelektrejoj de la gubernio aperis unu post alia, kies nombro jam atingis 246 en la fino de la lasta jaro. La granda parto de la monrimedo bezonata de tiuj elektrejoj estis preparita de la komunumoj kaj brigadoj, kaj la ŝtato donis al ili nur malmultan subvencion.

En la lastaj kvin jaroj la tuta provinco konstruis grandan nombron da mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj, 25% de kies monrimedo estis liveritaj de la ŝtato kaj la ceteraj estis preparitaj de la loko mem. Ankaŭ la ekipaĵoj de tiuj hidroelektrejoj inkluzive de generatoroj ĝenerale estis fabrikitaj de la gubernioj, subprovincoj kaj provinco. Nun Fuoŝan, Ŝantoŭ, Ĝangiang k. a. povas produkti generatorojn de 3,000, 6,500 kaj eĉ 9,000 kilovatoj. En Dabejŝan-hidroelektrejo ni vidis la du generatorojn de 9,000 kilovatoj kaj altpreman ŝtaltubon kun diametro de 1.3 metroj, kiuj estis faritaj de 18 fabrikoj de Ŝantoŭ-subprovinco en la socialisma kunlaboro. La Ŝantoŭ-a Elektromaŝina Fabriko, al kiu oni taskis produkti akvoturbinan generatoron, antaŭe estis malgranda fabriko kunigita el dekkelkaj metiejoj kaj povis produkti nur generatoron de malpli ol 12 kilovatoj pro manko de ekipaĵoj kaj teknikoj. Sed, sub la kuraĝigo de la instrukcio de Prezidanto Maŭ **"sinapogi sur propraj fortoj, peneme lukti en malfaciloj, rompi la superstiĉojn kaj liberigi la penson"**, la laboristoj kuraĝe akceptis la taskon fabriki akvoturbinan generatoron kun 9,000 kilovatoj. Dank' al diligenta laborado de la laboristoj kaj granda helpo de la koncernaj unuoj, la tasko fine plenumiĝis.

Por kulturi teknikistojn kaj administrantojn por la hidroelektrejoj, ĉiu gubernio kaj komunumo funkciigas trejnan kurson kaj ankaŭ venigas veteranajn laboristojn kaj teknikistojn por lernigi teknikojn al novaj laboristoj dum la konstruado. Krome iuj laboristoj estas senditaj al aliaj grandaj fabrikoj por lerni, kaj post kiam ili revenas al sia fabriko, ili konigas al aliaj laboristoj la lernitajn teknikojn. Plejparto de la novaj laboristoj estas gefiloj de kamparanoj kaj bone scias la urĝan bezonon de la kamparo. Pro tio ili diligente studas, entuziasme laboras kaj rapide posedis la teknikojn pri mezurado, masonado, instalado kaj manipulado de generatoro. Nun multaj el ili estis promociitaj kiel respondeculoj de grupo, laborejo aŭ hidroelektrejo.

## SINTEZA UTILIGADO DE AKVOFONTO

Ni venis al Enping-gubernio en suda parto de Guangdong kaj vizitis tiean konstruaĵon por sinteze utiligi Gingiang-riveron. La nomita rivero, kun longeco de 150 kilometroj, estas la ĉefa rivero de tiu gubernio. Sur la supra baseno ĝi torentas inter multaj montoj; kaj en la meza kaj malsupra basenoj ĝia fluejo estas zigzaga kaj la riverlito malprofunda pro sedimentiĝo. En pluvego monttorento en la supra baseno eroziis kampojn ambaŭflanke de ĝi; en la malsupra baseno ĝi superbordiĝis pro neglata riverujo, kaj en sekegeco ĝi sekiĝis kaj la kampoj kreviĝis. Post la Liberiĝo la popolo de Enping-gubernio konstruis 4 akvoutiligajn konstruaĵojn, kiuj mildigis minacon de sekeco kaj inundo al la rizkampoj de ambaŭ bordoj.

Sub la gvido de la gubernia partia komitato la popolo de Enping faris plenan reordigon al Gingiang-rivero en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ili konstruis multajn grandajn, mezajn kaj malgrandajn akvokonservejojn sur ĝiaj branĉoj de la supra baseno por produkti elektron. Oni konservas akvon laŭ 9 ŝtupoj en ĝia meza baseno, kio servas al irigacio de kampoj kaj produkto de elektro kaj plibonigas kondiĉojn de surakva transportado. En la malsupra baseno oni rektigis kaj dragis la riverfluejon por pligrandigi akvolasan kvanton kaj tiel evitigis atakon de inundo al la kampoj kaj vilaĝoj ambaŭborde de la rivero. Samtempe, ili faris forstumadon por ĉesigi erozion. Utiligante akvokonservejojn ili disvolvis fiŝbredadon kaj sur la monto disvolvis brutobredadon. Tie ni vidis, ke la riverbaraĵoj kaj hidroelektrejo staras majeste en la rivero, ŝipoj navigas tien kaj reen en ĝi, kaj la vastaj rizkampoj ambaŭborde en plena verdeco prezentas tute novan fizionomion.

En la lastaj jaroj la konstruado de la mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj de Guangdong-provinco disvolviĝis rapide, kaj ili estas sinteze utiligataj. La jungado kaj utiligado de la rivero Gingiang estas unu el la ekzemploj. Kien ajn ni iris, tie ni aŭdis laŭdon de amasoj pri bonoj de la mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj.

Tiuj mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj akcelas la konstruadon de drena kaj irigacia stacioj. Precipe en la malproksimaj kaj montaj regionoj kiujn ne povas atingi la centra elektroreto de la provinco, oni konstruis multajn elektrajn drenajn kaj irigaciajn staciojn, kio multe altigis kapablon kontraŭ inundo kaj sekegeco, kaj ebligis al hektara produktokvanto de greno de la provinco superi 6,000 kg. en sinsekvaj jaroj.



*Hidroelektrejo kun kapacito de 5,000 kilovatoj konstruita de la Ŝunde-gubernia popolo ĉe rivero nur 0.3 metron profunda*

La mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj rapidigis meĥanizadon de agrikulturo. Post starigo de hidroelektrejoj multaj komunumoj, precipe tiuj en malproksimaj montregionoj, efektivigis mekanikigon kaj duonmekanikigon de irigaciado, degrajnigo, muelado, sukerfarado, olepremado, dispecigo k.a., kiuj antaŭe estis plenumitaj per homofortoj kaj brutoj. Tio multe plibonigis laborkondiĉojn kaj liberigis laborfortojn.

La mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj liveras ĉiam pli multan elektron por la loka industrio. En la lastaj jaroj, kun konstruo de mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj aperis nombro da novaj fabrikoj en la gubernio Enping. Nun, tiu gubernio jam havas industriojn de kemisterko, cemento, maŝino, karbo, fandado, paperfarado, sukerfarado k. a. La totala produktovaloro de la industrioj de la tuta gubernio estas preskaŭ 4-oblo de tiu antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio.

Dank' al tiuj hidroelektrejoj pli vigliĝis la politika kaj kultura aktivadoj en la kamparo. Ĉiuj komunumoj kaj brigadoj funkciigas politikan vesperlernejon, artan propagandan taĉmenton kaj radiodisaŭdigon. Multaj el la komunumoj havas sian filmprojekcian grupon kaj X-radian aparaton. Kaj iuj el la produktaj brigadoj havas televidilon. Nun, elektraj lampoj anstataŭis olelampojn kiujn kamparanoj uzis por lumigo de generacio al generacio en la pasinteco.

La disvolviĝo de la mezaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj de Guangdong-provinco pliprosperigis agrikulturan produktadon kaj entreprenojn de komunumoj kaj brigadoj. Ekzemple, post konstruo de 15 hidroelektrejoj en la komunumo Hinfeng de Ĵaŭping-gubernio, plifortiĝis entreprenoj de komunumoj kaj brigadoj kaj disvolviĝis kolektiva ekonomio. La ekonomia proporcio de komunumo kaj brigado en la kampara ekonomio pliiĝis jaron post jaro. Tio utilas al transpaso de ekonomia kalkula sistemo kun produkta taĉmento kiel baza unuo al tiu kun brigado aŭ komunumo kiel unuo. Tio havas gravan signifon por plifirmigi kaj disvolvi socialisman kolektivan ekonomion kaj fortigi la diktaturon de la proletaro en la kamparo.

HIA MAŬLIN:

# Hiahian-gubernio plene verdigita

ĈIUN printempon kaj aŭtunon la kamparaj komunumanoj de Ĉinio disvolvas movadon de forstumado laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ "**verdigu la patrolandon**". Kiam ni venis al Hiahian-gubernio de Ŝanhi-provinco en la lasta printempo, tie leviĝis alta tajdo de forstumado. En kaj ekster vilaĝoj, sur kaj sub montoj, ĉie ni vidis homamasojn, kiuj plantis arbidojn. Kadro de la Gubernia Forstokultura Buroo ĝoje diris al ni: "La forstumado alportis bonon al la komunumanoj, tial pli kaj pli grandiĝas la nombro de arboplantantoj, kaj ĉifoje ĝi eĉ atingis centmil!"

*Kampoj borderitaj de forstozonoj*



## SUB LA ALVOKO "VERDIGU LA PATROLANDON"

Hiahian-gubernio situas sur la fame konata Leŭsa Altebenaĵo de Ĉinio. Ĝi konsistas duone el montetoj kaj duone el ebenaĵoj. En la pasinteco, tie plejparto de la montoj estis kalvaj kaj erozio seriozis; pro tromalmulteco de arboj sur ebenaĵoj vento kaj aliaj katastrofoj ofte atakis agrikulturajn plantojn, tial la meznombra hektara produktokvanto de greno estis nur iom pli ol 750 kg. Sed en la nuna Hiahian-gubernio prezentiĝas alia sceno: Ĉiu vilaĝo kaj ĉiu domo dronas en verdaj ombroj; la kampoj estas dekraditaj de vicoj kaj vicoj da arboj; sur montoj prospere kreskas junaj arboj. Ĉiu persono de la gubernio havas meznombre pli ol 100 arbojn plantitajn sur apudaj terenoj de vojoj, kampoj, domoj kaj akvoj.

Parolante pri la forstumado de Hiahian-gubernio, oni nepre rakontas al vi pri Guodaŭ-brigado, kiu sidas parte sur monto kaj parte sur ebenaĵo. En la pasinteco ĝia monto estis kalva kaj la ebenaĵo sala-alkala. En la komenca periodo post la Liberiĝo unu el la gvidantoj de la gubernio venis tien por helpi la lokajn kadrojn en laboro kaj trovis, ke prospere kreskas agrikulturaj plantoj sur alkala parcelo, kiun iu kamparano ĉirkaŭigis per kanaleto kaj arboj por multe redukti la alkalecon. Poste, sub lia iniciato la sperto de tiu kamparano estis disvastigita tra la tuta vilaĝo. Kun disvolviĝo de agrikultura koopera movado, la Agrikultura Kooperativo de Guodaŭ ne nur plantis pli ol 100,000 poplojn, sed ankaŭ reformis la salajn-alkalajn kampojn, akcelis disvolviĝon de agrikulturo kaj forstumado, solvis la problemon de longtempa manko de greno kaj havigis al si lignon por konstrui domojn kaj fari agrikulturajn instrumentojn, tiel ke la vilaĝo fariĝis modelo de forstumado en la gubernio.

En la jaro 1956, Prezidanto Maŭ faris la alvokon **"verdigu la patrolandon"**, kaj tio donis grandan kuraĝigon al la popolo de la gubernio. Laŭ la postulo difinita en la Tutlanda Programo por Disvolvo de Agrikulturo, la partia komitato de Hiahian-gubernio kondukis la movadon de lernado de Guodaŭ-brigado en forstumado ĉe la kvar apudaĵoj. Sed la bienuloj faligitaj en la agrara reformo ne volontis agnoski sian malvenkon kaj faris subfosadon per dissemado de la superstiĉo, ke plantado de arboj ĉirkaŭ la domo alportos malfeliĉon. Krome, ankaŭ iuj kadroj kaj komunumanoj opiniis, ke verdigo de la kvar apudaĵoj bezonas labortempon kaj malhelpas la agrikulturan produktadon. Fronte al tiu stato, la partia komitato de la gubernio organizis viziton de kadroj kaj kooperativanoj al Guodaŭ. La prospereco de arbarizado kaj agrikulturo en la kooperativo komprenigis la vizitantojn, ke la opono de la klasaj malamikoj kontraŭ forstumado celis teni la kamparon ĉiam en postiĝinta stato por restarigi sian perditan regpotencon. Post kiam altiĝis la politika konscio de la amasoj, rapide leviĝis la tajdo por verdigi la kvar apuda-




*Sekretario Niu de la gubernia partia komitato plantas arbidojn.*

jojn kaj aperis nombro da avangardaj unuoj kaj homoj en forstumado.

La fondo de popolaj komunumoj malfermis vastan perspektivon al la disvolvo de agrikulturo kaj arbarizado. La komunumoj havas vastan teritorion, multajn laborfortojn kaj grandan kvanton da materialo kaj kapitalo. Tio ebligas al la komunumoj fari unuecan konstruan planon de kampoj, vojoj, forstozonoj kaj kanaloj. Post la fondo de la komunumoj la gubernio serioze plenumas la instrukcion de Prezidanto Maŭ "**ĝardenigi la kampojn**", firmigis kaj disvolvis la fruktojn akiritajn en verdigo de la kvar apudajoj

*En Guodaŭ-brigado*




kaj ricevis la gloran titolon de "Avangarda Gubernio en Verdigo de la Kvar Apudajoj", donitan de la Ministerio de Agrikulturo kaj Forstokulturo de la Ŝtata Konsilantaro. Sed, en la komenco de la sesdekaj jaroj la konstruado de arbokraditaj kampoj estis multe malhelpata de tio, ke Liu Ŝaŭki ordonis individuan mastrumadon de agroj en la kamparo. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la vastaj amasoj de komunumanoj kaj kadroj kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki, vigle disvolvis la movadon de lernado de Dajĝaj kaj levis novan tajdon de agrara fundamenta konstruado. Tio ne nur rapide kreis pli ol 23,300 hektarojn da arbokraditaj kampoj, sed ankaŭ komencis verdigadon de kalvaj montoj. Kiam ni venis al iu monto de Nianĝang-komunumo, ni vidis prosperajn arbetojn ĝin plene kovrantajn. Kadro de la Forstokultura Buroo diris, ke nun 84% de la kalvaj montoj en la tuta gubernio estas jam forstumitaj, kaj ankaŭ la cetera parto sin vestos per verdaĵoj post kelkaj jaroj.

## DILIGENTAJ ARBARIZISTOJ

Hiahian-gubernio akiris grandan sukceson en verdigado de montoj dank' al la diligenta laborado de kadroj kaj komunumanoj. Por fari bonon al la postaj generacioj, ili volontas pene kaj tutanime disvolvi la arbarizadon.

"Ni direktas niajn okulojn ne nur al la hodiaŭaj interesoj, sed ankaŭ al la estontaj por feliĉigi la pranepojn!" ofte diris Liu Kingkjuan, sekretario de la gubernia partikomitato. En la unuaj kvindekaj jaroj, pro disvolviĝo de produktado puŝata de la agrara reformo kaj la agrikultura koopera movado, kaj pro pliboniĝo de la vivo, la kooperativoj bezonis pli kaj pli multe da ligno por konstrui tenejojn kaj domojn kaj fari agrikulturajn instrumentojn kaj meblojn por kolektiva kaj privata uzo. Kiel solvi la problemon? Li pensis: Nia lando estas granda, kaj ĉiuj branĉoj de industrio kaj agrikulturo kaj la popola vivo bezonas lignon. Kiom grandan kvanton da ligno bezonas la tuta lando! Ni nepre ne ŝarĝos la ŝtaton per nia bezono. Li kredas, ke la manko de ligno certe estos plenumita, se oni nur persistos en forstumado sin apogante sur propraj fortoj. La fakto, ke la forstumado de la Agrikultura Koope-



*Flegado de arboj*

rativo de Guodaŭ akcelis la disvolviĝon de agrikulturo, komprenigis al li, ke la arboplantado ne estas portempa rimedo, sed grava afero koncernanta reformadon de la naturo, altigon de produkto kaj feliĉigon al la venontaj generacioj. Pro tio li propagandis ĉie, kien li venis, la instrukcion de Prezidanto Maŭ pri forstumado al kadroj kaj komunumanoj. Ĉiun printempon kaj ĉiun aŭtunon li faris arboplantadon kune kun komunumanoj. La rapida disvolviĝo de forstumado kaŭzis al la gubernio nesufiĉon de arbidoj por plantado, kaj por solvi tiun problemon li la unua aktive kulturis arbidojn en sia korto. Sub la influo de lia modela agado leviĝis movado "ĉiuj ekagu por kulturi arbidojn", per kio oni ne nur rapide venkis la mankon de arbidoj en la tuta gubernio, sed ankaŭ povas liveri al frataj gubernioj milionojn da arbidoj ĉiujare.


Same kiel Liu Kingkjuan, ĉiuj postaj sekretarioj de la gubernio tiel agis. Ili donis grandan atenton al tiu laboro. La gubernio, komunumoj kaj brigadoj postenigis specialajn kadrojn por respondeci la arbarizadon, kaj krome fondis kulturejojn de arboj kaj arbidoj, por ke progresu la plantado de kelkopaj arboj, verdigo de la kvar apudaĵoj, konstruado de arbokraditaj kampoj kaj arbarumado de kalvaj montoj.

Ne nur la gvidantaro de la gubernio atentas tiun laboron, sed ankaŭ la vastaj amasoj de ko-

munumanoj entuziasme partoprenis en ĝi. Ĉiutage multaj homoj diligente faras zorgan flegadon en arbobedoj, ekstermas herbojn kaj fiinsektojn en forstozonoj kaj stucas arbojn; kaj iuj eĉ loĝas en arbaro ĉu en varmega aŭ frosta sezono. Sun Fuhua, maljuna malriĉkamparano de Hjueĝuang-brigado, ofte diras: "En la malnova socio ni volis planti arbojn, sed ne havis lokon. Nun Prezidanto Maŭ faris la alvokon, do ni devas aktive respondi al ĝi!" Li memvole kulturis arbidojn por la brigado en sia ĝardeno kaj ĉiam prenas pezan taskon sur sin en forstumado. Iufoje li estis vundita dum arboplantado, oni portis lin en hospitalon, sed li ŝtele revenis al la brigado por peti taskon. Poste, li fariĝis arboprotektanto de la brigado kaj des pli ŝatas sian laboron. Kiam aperas herboj inter arboj, li tuj forigas ilin; kiam arboj suferas de trosekeco, li akvumas ilin. Kelktempe li eĉ forgesis manĝi. Krome li kulturas legomojn, tritikon, kuracherbojn sur la spacoj inter arboj, kio plimultigas grenon kaj enspezon por la kolektivo.

En Hiahian-gubernio troviĝas ne nur multaj maljunaj modeloj kiel Sun Fuhua, sed ankaŭ granda nombro da junuloj amantaj arbarizadon kiel 23-jara Liu Juegian. Post kiam ŝi finis sian studon en mezlernejo, ŝi revenis al la hejmloko. Apud ŝia vilaĝo troviĝas monto. En la pasinteco ĉiujare oni plantis arbojn sur la monto, sed malmultaj restis vivaj. Liu Juegian trovis, ke tion kaŭzis ĉefe la manko de akvo. Ŝi pensis, ke la Daĝaj-anoj povis konstrui akvocisternojn sur la Tigrokapa Monto, kial ili ne povas tion konstrui sur la monto? Ŝia propono ricevis aprobon de la partia filio. Tuj poste pli ol 25 junuloj sub ŝia gvido ascendis la monton kaj komencis kolekti ŝtonojn, masonis basenon kaj fosis kanaleton.

*Arbokultura esplorado*




Nokte ili studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj resumis la tagan laboron. Dank' al tio rapide konstruiĝis akvocisterno, per kiu oni povas irigacii dudek mil cipresojn antaŭe plantitajn sur la monto. Nun la aspekto de la monto jam ŝanĝiĝis: Sur la monto verdas pinoj kaj cipresoj, ĉe la monttalio smeraldas robinioj kaj sub la monto aromas floroj de fruktarboj. Nun ŝi laboras kiel sekretario de la partia filio de la brigado kaj membro de la partia komitato de la komunumo. Kvankam ŝi estas tre okupata, tamen ŝi ankoraŭ multe zorgas pri forstumado. En la lastaj jaroj ŝi kaj aliaj junuloj kune faris eksperimenton pri plantado de diversaj arboj. En ilia bedo kreskas metasekvojoj kaj cedroj el suda Ĉinio kaj krome poploj, salikoj, ulmoj kaj soforoj. Estas dekoj da specoj sole de poploj. Ŝi diris al ni: "Bonvolu veni ĉi tien post kelkaj jaroj kaj vi vidos, ke multspecaj arboj de diversaj lokoj de la patrolando kreskas sur nia tero kaj faras sian generadon!"

## PROSPERAS ARBOJ KAJ ABUNDAS GRENO

Dum nia vizito al Hiahian-gubernio ni informiĝis, ke vigla disvolviĝo de la arbarizado ludas ĉiam pli grandan rolon en reguligo de klimato, tenado de humideco kaj plibonigo de kreskaj kondiĉoj de agrikulturaj plantoj. En la pasinteco tritiko de Dalju-komunumo ofte suferis de prujno en printempo kaj de seka varma vento en la komenco de somero. Post plantado de arboj la minaco de prujno kaj varma vento multe mildiĝis, kaj la meznombra hektara produktokvanto de tritiko kreskis de 800 ĝis 3,750 kg. La meznombra hektara produktokvanto de greno de Guodaŭ-komunumo multe suferinta de saloalkalo atingis pli ol 5,250 kg. dank' al plantado de poploj kaj fosado de kanaloj. Samtempe kun tio aperis ankaŭ avangardaj brigadoj kiel Luotuovan kaj Nankiaŭ, kies meznombra hektara produktokvanto de greno kaj sensemigita kotono superis respektive 7,500 kg. kaj 750 kg.

La disvolviĝo de arbarizado kreis bonajn kondiĉojn por brutobredado. La folioj de arboj servas kiel bona furaĝo. Krome la branĉoj ĉiujare stucitaj estas liveritaj al la komunumanoj kiel hejtaĵoj sufiĉaj por tri monatoj, tiel ke oni povas ŝpari grandan kvanton da grenplantaj tigoj taŭgaj por furaĝo. Sufiĉa furaĝo akcelas disvolviĝon de brutobredado. La nombro de porkoj dekobliĝis kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo kaj ankaŭ tiu de aliaj brutoj multe kreskis.




*Meteostacio*

La disvolviĝo de arbarizado plifortigis la kolektivan ekonomion de popola komunumo. Depost kiam Hiahian-gubernio komencis alterne haki arbojn plantitajn sur la kvar apudaĵoj, ĝi ne nur kontentigis sian bezonon de ligno sed ankaŭ povas ĉiujare plimultigi enspezon de la forstokulturo, kiu superis 9% de la totala agrikultura enspezo. La totala valoro de la uzeblaj arbotrunkoj nun kreskantaj sur la kvar apudaĵoj sur

la ebenajoj atingis pli ol 28 milionojn da juanoj, nome, proksimume 20,000 juanojn por ĉiu brigado. Tiu enspezo liveras al Hiahian-gubernio grandan kvanton da kapitalo por agrikultura meĥanizado kaj irigacia konstruado. En la jaro 1973, la gubernio aĉetis, per la enspezo de la forstokulturo, pli ol 1,100 agrikulturajn maŝinojn, fosis 73 maŝinputojn kaj plivastigis la irigacian areon de kampoj je 1,000 hektaroj.

En la nuna kamparo de Hiahian-gubernio maŝinoj laboras sur kampoj, kaj la nove konstruitaj domoj el brikoj kaj tegoloj staras en verdaj ombrajoj. Tre okulplaĉas la nova aspekto.

*Arboj apud vojo*



HINHIN:

# Kelkaj rakontoj pri ruĝgvardianoj

## Savo de trajno

Estis posttagmezo de la 3-a de marto, 1976. Vu Vejĝong, lernanto de la Elementa Lernejo Hiniulu de Kantono, kaj liaj kamaradetoj laboris en iu brigado de la antaŭurbo. Ili forigis herbaĉojn en legomkampo apud fervojo. De malproksime fluge alkuris trajno, kaj ĝuste tiam Vu Vejĝong rimarkis, ke bubalo ligita al arbo rompis la ligilon kaj kuris al la fervojo. Vu Vejĝong fluge trakuris la kampon kaj pafiĝis al la fervojo.

La bubalo, kvazaŭ fascinita de la muĝanta trajno, staris senmove sur la trako.

La sekuro de la trajno pendis nur sur unu haro!

Tiam Vu Vejĝong jam surpaŝis la trakon. Li kuraĝe kaj aplombe kaptis la ŝnuron, volvis ĝin kelkajn fojojn sur sian manon kaj forte ektiris. Sed la bubalo tute ne moviĝis.

La trajno pli kaj pli proksimiĝis kaj la distanco restis nur 50 metroj, 30 metroj...

En tiu kriza momento Vu Vejĝong, firme tenis la ŝnuron, ektiris ĝin per la tuta forto kaj fine sukcesis fortiri la bubalon de la trako.

La pasaĝertrajno sekure trapasis kaj kuris plu antaŭen.

## Redoni monon al perdinto

Posttagmezon de la 15-a de decembro de 1975, ruĝgvardianeto Je Honghiang de la Elementa Lernejo Ĉanggiang de la urbo Anking de Anhuj-provinco iris aĉeti grenon kune kun sia avino. Revenvoje li trovis paketon apud la vojo, levis ĝin kaj vidis, ke en ĝi estas multe da 10-juanaj monbiletoj. "Ho, kiu perdis tiel multe da mono!"

Li rigardis ĉirkaŭen kaj vidis neniun krom sia avino. Li tuj metis la paketon en sian poŝon kaj kuris al la lernejo kunportante la grensakon.

Vidinte malgrandan Je ŝviteganta kaj anhelanta, instruistino Ĝeng Jan-gju tre miris kaj demandis, kio okazis. "Jen mono ĵus trovita de mi survoje," diris malgranda Je donante al ŝi la trovitan monon. "La perdinto nun certe brule maltrankvilas. Bonvolu serĉi lin." La instruistino detale pridemandis la aferon kaj nombris la monbiletojn sume 580 juanojn. Ŝi rapide raportis tion al la direktoro de la lernejo kaj koncerna fako, por ke ili serĉu la perdinton.

Samtempe kun tio en la regimento de civitanoj-konstruantoj de Tongĉeng-gubernio, kiu venis al Anking por helpi la konstruadon de tiea termoelektrejo oni parolis pri malfeliĉaĵo: Posttagmezon de la 15-a, malriĉkamparano Vu Zongki prenis de la regimenta administrejo vivtenan pagon por la dekoj da konstruantoj de sia grupo, sed li perdis la monon survoje. Respondeculo de la regimento raportis la aferon al la proksima policejo kaj petis de ĝi helpon.

Dank' al energia helpado de oficejo de publika sekuro, Vu Ĝongki venis al la Elementa Lernejo Ĉanggiang. Kiam li reakiris la perditan monon, li emocie diris al Je Honghiang: "Vi estas vera ruĝgvardianeto de Prezidanto Maŭ!" Malgranda Je respondis: "Prezidanto Maŭ alvokis ke ni lernu de Lej Feng[1], kaj mi agis laŭ la ekzemplo de onklo Lej Feng."

## Malgranda heroo mortigis leopardon

La 6-an de marto de la kuranta jaro Ĝeng Ĝengkiang, lernanto de mezlernejo Hilong de Hinjang-gubernio de Hubej-provinco, kaj liaj kelkaj kamaradoj estis kolektantaj brullignon kilometron fore de sia hejmo. Subite elsaltis el montkavo leopardo kaj sin ĵetis al la knaboj. En tiu danĝerega momento Ĝeng Ĝengkiang ekme-


moris la heroan figuron de Pan Dongzi[2], kiu kuraĝe luktis kun malamikoj sen timo al morto. Ĝeng Ĝengkiang havis nur unu ideon: "Nepre mortigi la leopardon!" Li kaptis vekton kun feraj pintoj kaj sin turnis kriegante al la leopardo. La leopardo estis ekscitita de la kriego, kaj sin ĵetis al Ĝeng. Li tuj sagace kaŝis sin malantaŭ ŝtonegon kaj gvatis la leopardon. Kiam la leopardo saltis trans lian kapon, li levis la vekton, kaj batis ĝin je la ventro. La leopardo ekmuĝegis, reĵetis sin al Ĝeng Ĝengkiang, sed falis en kavegon 3 metrojn profundan. Tiam, la frato de Ĝengkiang alrapidis. Ili ambaŭ suriris altaĵon, ĵetis al la leopardo grandan ŝtonon, kaj grave vundis la talion de la leopardo. Laŭ instruo de Prezidanto Maŭ **"antaŭ rabobesto oni devas montri neniom da timo"**, ambaŭ fratoj saltis en la kavon kaj forte batis la leopardon per vekto kaj hakilo. Fine la leopardo mortis post kelkaj blekoj.

---

1 *Kamarado Lej Feng estis modela soldato de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Li fervore studis verkojn de Prezidanto Maŭ, estis senegoisma kaj helpema al aliuloj kaj servis tutkore al la popolo. La 15-an de aŭgusto de 1962 li oferis sian vivon en laboro. La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ persone skribis la alvokon* **"Lernu de kamarado Lej Feng".**

2 *Pan Dongzi estas malgranda heroo en la filmo "Trembrilanta Ruĝa Stelo." (Legu artikolon pri ĝi en EPĈ n-ro 4, 1975.)*

# Ekspozicio de Ĉinaj Metiartaĵoj en Novzelando




Kiel unu el la temoj de kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Novzelando, la Ekspozicio de Ĉinaj Metiartaĵoj okazis antaŭ nelonge en Christchurch sur la Suda Insulo de tiu lando. Bonan akcepton kaj aplaŭdon trovis tie kelkcent ekspozataj belaj kaj delikataj metiartaĵoj inkluzive de skulptaĵoj el eburo kaj jado, brodaĵoj, murtapiŝoj, fajencaĵoj kaj porcelanaĵoj, plektaĵoj, lakobjektoj kaj klozoneaĵoj.

Christchurch, la fama kultura urbo de Novzelando, estas la plej granda urbo sur la Suda Insulo, kie pitoreskas la pejzaĝo kaj plaĉas la klimato. Sudokcidente de la urbo situas la belarta halo de la Arta Ligo de Canterbury, kie okazis la ĉina ekspozicio. Dum duonmonata ekspozado ĉie regis profunda amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Novzelando.

Respondeculo kaj multaj vizitantoj diris al ni, ke post finkonstruiĝo de la belarta halo en 1968, tie okazis diversaj ekspozicioj kiel tiuj de brodaĵoj, de aplikataj fajencaĵoj kaj porcelanaĵoj kaj de abstraktismaj pentraĵoj, sed neniu el ili havis tiom da rigardantoj kiel la ĉina metiarta ekspozicio. Precipe en semajnofino, la granda halo estis plena de vizitantoj kaj ili devis sin vicigi por rigardi.


La vizitantoj venis de diversaj lokoj de Novzelando, ĉu de Dunedin en la plej suda parto, ĉu de Auckland de la Norda Insulo. Inter ili troviĝis junuloj, maljunuloj, knaboj, laboristoj, oficistoj, lernantoj kaj metiartistoj kaj ankaŭ turistoj el Usono, Britio, Aŭstralio kaj Kanado.

La novzelanda gazetaro faris varmajn komentariojn. Iu rigardantino nomis la ekspozicion "tiu kiu forigis la oldajn por elŝovi la novajn". Iu pentristo diris al ĉinaj amikoj: "Dankon al vi pro tiel bona ekspozicio. Mi ne havas ŝancon viziti vian landon, tamen en tiu ĉi ekspozicio mi vidis la spiritan fizionomion de la ĉina popolo en pena luktado por prosperiĝo."

En nur pli ol du tagoj antaŭ la oficiala malfermiĝo de la ekspozicio oni finis aranĝadon de centoj da ekspozaĵoj. Tio ja estis afero nefacila. Ĉar iuj el ili devas esti pendataj, al aliaj oni devas aldoni bretojn kaj triaj bezonas specialajn ŝrankojn. Por ke la ekspozicio malfermiĝu en la difinita tago, la novzelandaj laboristoj, projektistoj kaj niaj novzelandaj akompanantoj faris strečan laboradon kune kun la ĉinaj laborantoj.

Malfermiĝis la ekspozicio en la difinita tago, kaj en la halo svarmis rigardantoj. Estis okulfrape, ke ĉiutage kelkaj vizitantoj kun flava rubando sur korpo kaj insigno de "laboranto" sur la brusto fervore faras klarigojn en la halo. En semajnofino, tiaj vizitantoj plimultiĝis. Informiĝinte pri okazigo de la ĉina ekspozicio, tiuj novzelandaj amikoj meminiciate sin anoncis por esti volontaj klarigantoj. Unu el ili estis pli-ol-60-jara S-ro McArthur, vicprezidanto de la Novzelanda-Ĉina Amikeca Asocio. Li vizitis Ĉinion en 1967 kaj estas nia malnova amiko. Ekde la malfermiĝo de la ekspozado, li ĉiutage venis ĝustatempe al la halo eĉ en pluvaj tagoj. Por ke aliaj pli klare vidu la duflankan brodaĵon, li aparte metis du lupeojn antaŭ la ekspozaĵo. Krome li verkis komentariojn pri la ekspozicio por la plej granda gazeto de Novzelando.

Dum la ekspozado ni ĉiam vivis en amika atmosfero. Kiam ni rememoris tiujn belajn tagojn, niaj koroj kvazaŭ ondoj de Tasmanmaro longtempe ne povis kvietiĝi. Ni deziras, ke senĉese disvolviĝu la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Novzelando.



*Varmaj rigardantoj de Christchurch*

# La bulangoj

de **ZONG MIN**




La bulangoj estas unu el la antikvaj naciecoj de Ĉinio. La ĉ. 42,000 bulangoj (en la jaro 1957) loĝas ĉefe en Bulangŝan kaj Hiding de la Hiŝuangbanna-a Taj-a Aŭtonoma Subprovinco kaj en la regionoj Lincang kaj Simaŭ en la suda parto de Junnan.

Laŭ historiaj notoj, frue en Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) la praavoj de la bulangoj kaj aliaj naciecoj jam vivis en la okcidenta parto de la nuna Junnan-provinco, kaj tiam ili sin vivtenis ĉefe per kolektado de fruktoj kaj ĉasado. Poste, pro kruela subpremado de la feŭda reganta klaso, la bulangoj plurfoje transloĝiĝis suden kaj en la 18-a jarcento jam formiĝis ilia nuna dislokiĝa stato. En Ming-dinastio (1368 — 1644 p.K.) la bulangoj iom post iom prenis agrikulturon kiel sian ĉefan okupon.

La bulangoj plejparte loĝas en montoj je pli ol 1,500 metroj super

la mara nivelo. La ĉefa grenplanto kulturata de ili estas rizo kaj krome ili kulturas ankaŭ maizon kaj sojfabon, kaj ekonomiajn plantojn kiel kotonon, sukerkanon kaj teon. Bulangŝan kaj Hiding ankaŭ estas produktaj lokoj de la fama *puer*-teo.

Antaŭ la Liberiĝo, la socio de la bulangoj disvolviĝis tre malegale. La bulangoj en la regionoj Lincang kaj Simaŭ jam iris en la stadion de feŭda bienula ekonomio; kaj la tieaj bienuloj kaj kulakoj kruele ekspluatis la malriĉajn kamparanojn per uzuro, lombardo, komerco kaj eĉ politika privilegio, kaj alproprigis al si la fekundajn kampojn. La malriĉaj kamparanoj suferis subpremon kaj ekspluaton ankaŭ de reakciaj regantoj de hana kaj aliaj naciecoj kaj vivis tre malfacile. La bulangoj en Bulangŝan kaj Hiding tiam ankoraŭ estis en la stadio de primitivaj klanaj kaj kamparaj komunumoj. La klana komunumo karakteriziĝis per tio, ke ĉiu vilaĝo konsistis el unu patriarka klano, la agroj apartenis al la klana komunumo kaj estis ĉiujare dividitaj de la patriarko al la familioj, kaj la rikoltaĵoj apartenis al la familioj. Tiaj klanaj komunumoj en Bulangŝan kaj Hiding restis nur malmultaj, kaj la plejparto de la tieaj vilaĝoj estis kamparaj komunumoj kun la karaktero, ke ili konsistis el kelkaj ĝis dekkelkaj familioj venintaj de diversaj lokoj kaj ĉiu klano konsistis el nombro da malgrandaj familioj de monogamio. La produktaj instrumentoj, domoj kaj brutoj apartenis al la familioj; la agroj, montoj kaj arbaroj apartenis al la komunumoj kaj estis dividitaj ĉiujare de la patriarko al la familioj por uzado; kaj la produktaĵoj apartenis al la familioj. Se iu familio transloĝiĝis aliloken, la komunumo do reprenis la agron. Se alvenis iu nova familio kaj petis permeson loĝi kaj terkulturi en la vilaĝo, tiam oni okazigis kunvenon por decidi repreni parton de la kampoj de familio, kiu havis multe da tio, kaj ĝin doni al la nova familio. La teritoriaj limoj de la komunumoj estis fiksitaj kaj la komunumoj havis komunajn religiajn aktivadojn. Antaŭ la Liberiĝo en malmultaj vilaĝaj komunumoj la kampoj estis fikse uzataj de la familioj, kaj samtempe kun la ekzisto de komuna posedsistemo de kampoj, jam aperis privata posedsistemo de malsamaj gradoj. La kampoj kaj teplantejoj de iuj vilaĝoj plejparte apartenis al la patriarko aŭ riĉaj familioj, multaj membroj de vilaĝaj komunumoj perdis siajn kampojn kaj fariĝis kampluantoj. Uzuro, dungado de kamplaborulo, kampluado kaj aliaj ekspluataj formoj iom post iom disvolviĝis. Antaŭ la Liberiĝo, ĉe la bulangoj en Bulangŝan kaj Hiding jam aperis klasoj kaj rapide disfalis la primitiva komuna posedsistemo.

En la historio la bulangoj estis nacieco kun tradicio de batalado, kaj ili plurfoje faris arman insurek-



*Bulang-aj infanoj*

cion kune kun alinaciecaj popolanoj kontraŭ la reakciaj feŭdaj regantoj de diversaj dinastioj. En 1861, bulangoj faris arman insurekcion kune kun hanioj kaj aliaj naciecanoj kontraŭ la kruela regado de King-dinastio kaj la batalo daŭris 7-8 jarojn. Ankaŭ dum la reakcia regado de Kuomintango la bulangaj popolanoj batalis kontraŭ ĝi plurfoje. Post la mezo de la 19-a jarcento, Ĉinio estis multfoje invadita de imperiismoj kaj iom post iom fariĝis duonfeŭda kaj duonkolonia, kaj bulangoj kune kun hanoj kaj alinaciecanoj batalis kontraŭ imperiismoj agresantaj la limregionon de nia Junnan-provinco. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, ili rezistis kune kun tajoj, hanoj, hanioj kaj lahuoj kontraŭ la invado de la japana imperiismo al Hiŝuangbanna kaj faris sian kontribuon en la batalo por defendi la limregionon de la patrolando.


Post la Liberiĝo, sub la saĝa gvido de la granda gvidanto de ĉiuj naciecoj de Ĉinio Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la bulangoj ĝuas egalecon kaj aŭtonomecon de nacieco, same kiel la aliaj frataj naciecoj. En la komenca periodo post la Liberiĝo, la Partio kaj la popola registaro energie faris socian savlaboron, liveris senpage produktajn instrumentojn kaj aliajn bezonaĵojn al la bulangoj por helpi ilin disvolvi la produktadon kaj bonigi ilian vivon. La bulangoj en la regionoj Lincang kaj Simaŭ faris la agraran reformon kaj la agrikulturan kooperativigon, kaj en 1958 efektivigis popolkomunumigon. En Bulangŝan kaj Hiding oni komencis starigi interhelpajn agrikulturajn grupojn nur en printempo de 1956, provis fondi agrikulturajn produktajn kooperativojn en 1958 kaj fondis popolajn komunumojn en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la bulangaj popolanoj energie kondukis akvoutiligan konstruadon, senĉese rebonigis la postiĝintajn produktajn manierojn kaj terkulturajn teknikojn kaj disvolvis meĥanizon de agrikulturo per siaj kolektivaj fortoj kaj en penema luktado kontraŭ malfaciloj, kaj plialtigis la produktokvanton de greno de jaro al jaro. Precipe post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la bulangoj disvolvis potencan movadon de lernado de Daĝaj en agrikulturo, rezolute oponis kontraŭ la ĝeno de la kontraŭrevoluciaj reviziismaj linioj de Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj Deng Hiaŭping kaj batalis kontraŭ la naturo por konstrui novan socialisman kamparon. Antaŭ la Liberiĝo tute ne ekzistis akvokampo en Bulangŝan, kaj tieaj loĝantoj scipovis nur terkulturi per primitiva metodo. Post la Liberiĝo, la bulangoj reformis la naturon kaj formis pli ol 666 hektarojn da akvokampoj, sub helpo de frataj naciecanoj. Mannan-taĉmento de Bulangŝan-komunumo estas vilaĝo ĉirkaŭata de montoj. Pro la situo de izoliteco, ĝi suferis de atencado de sovaĝaj bestoj antaŭ la Liberiĝo kaj en la komenca periodo post la Liberiĝo. Ĝiaj dombestoj ofte estis forportitaj de tigroj kaj lupoj, ĝiaj grenplantoj ofte estis detruitaj de sovaĝaj bestoj kaj ankaŭ loĝantoj de tiuj lokoj estis atakitaj de tigroj kaj leopardoj. Tial antaŭ la Liberiĝo, restis tie nur 7 el la antaŭaj pli ol 20 familioj, kaj ili havis nek bovon nek ĉevalon. Post la Liberiĝo, la bulangoj sin armis sub la helpo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj elmetis la devizon: "Venku la sovaĝajn bestojn por disvolvi la produktadon". Ili klopodis ĉiamaniere por mortigi kaj kapti sovaĝajn bestojn kaj rapide ilin ekstermis. Per multjara ĉasado, komunumano Jan Guangĝang sola mortigis pli ol 200 tigrojn, leopardojn, aprojn, etcervojn k.s. kaj estis honore titolita kiel ĉasheroo. Samtempe kun tio la komunumanoj konstruis dekkelkajn irigaciajn kanaletojn kaj pli ol dek hektarojn da akvokampoj por disvolvi la produktadon. Ankaŭ la nombro de la familioj en la vilaĝo kreskis ĝis 38. La produktokvanto de greno de tiu produkta taĉmento kreskis ĝis 78,500 kilogramoj kaj tiu taĉmento, kiu antaŭe ĉiujare bezonis helpan grenon de la ŝtato, ekhavis grenon superbezonan.

Konforme al la bezono de la disvolviĝo de la produktado de la bulangoj kaj la plibonigo de ilia vivo, butikoj fondiĝis en lokoj koncentre loĝataj de ili. Kaj krome la ŝtato disponigas al bulangaj regionoj ankaŭ senpagan kuracan servon kaj lernadon. Antaŭ la Liberiĝo, en la bulangaj regionoj troviĝis neniu lernejo, sed nun en ili jam funkcias multaj elementaj kaj mezgradaj lernejoj. La komunumoj havas kuracejon kaj kuracajn grupojn, kiuj energie laboras por preventi kaj kuraci malsanojn. Multaj bulangaj montvilaĝoj konstruis malgrandajn hidroelektrejojn, tiel ke la elektraj lampoj kaj elektraj rizmueliloj anstataŭis la pinbranĉajn lumigilojn kaj ŝtonajn rizpistilojn, kiujn la bulangoj uzadis dum multaj generacioj, kaj ankaŭ la draŝado de greno kaj preparado de teo estas farataj de maŝinoj.

De terkulturado per primitiva metodo al kulturado de rizkampoj per maŝinoj, de primitivaj sociaj formoj al la popola komunumo, de senskriblingveco al fondo de elementaj kaj mezgradaj lernejoj . . . la bulangoj trapasis gigantajn profundajn ŝanĝojn. La bulanga popolo estas marŝanta sur la socialisma ŝoseo per grandaj paŝoj.

# La Flavturbana Insurekcio

*Ĝang Giaŭ kaj liaj fratoj ĉe fronto*



*Malriĉaj kamparanoj de diversaj lokoj venis malgraŭ longa vojaĝo por aliĝi al la Flavturbana Armeo.*



EN la jaro 184 p. K. eksplodis la granda Flavturbana Insurekcio de la lasta periodo de Orienta Han-dinastio, fame konata en la ĉina historio. Oni nomis la insurekciajn trupojn Flavturbana Armeo pro tio ke ĝiaj anoj portis flavan turbanon sur la kapo. Tiu insurekcio estas grandskala kamparana insurekcio longe organizita kaj preparita kun programo en la ĉina historio.

La Orienta Han-dinastio (25—220 p. K.) estas unu el la plej mallumaj kaj putriĝintaj dinastioj de la ĉina feŭda socio. Tiam la regpotenco estis tenata de la reakciaj grandaj burokratoj kaj bienuloj. Ili senbride alproprigis al si teron, rastis riĉajojn, rabis sklavojn, kruele ekspluatis la popolon kaj vivis diboĉe. En la lasta periodo de tiu dinastio, la eŭnukoj, imperiestraj parencoj kaj burokratoj ekspluatis pli senbride, batalis inter si kaj ekstreme putriĝis en politiko. Imperiestro Liu Hong estis tirano diboĉema kaj avida. Por kolekti monon li eĉ senkaŝe establis "Ŝtatofican vendejon". Diferencaj prezoj estis difinitaj laŭ la rangoj de oficoj. Se oni ne havis monon, li povis havigi al si oficon kredite je duobla kosto. Tiam la kamparo ĉie estis en malprospero kaj la vastaj amasoj de malriĉaj kamparanoj baraktadis kun morto. Kiel historiaj libroj diris: "La tero vastis, sed ne estis kulturita; la popolanoj multis, sed malsatis", kaj "ĉie troviĝis mortintoj kuŝantaj unu sur alia". La kruelaj ekspluatado kaj subpremado fare de la reakcia reganta klaso kaŭzis kontraŭstaron de la kamparanoj. En diversaj lokoj leviĝis kamparanoj unuj post aliaj. Tiam cirkulis brava popolkanto:

*Rekreskas kiel odorumo* (Allium odorum)
*la haroj post tondado:*
*rekrias kiel koko*

*la kapo post dehako.*
*Ne ignoreblaj estas la plebanoj*
*kaj ne timindaj estas l' oficistoj*
*de la ŝtato.*

Tiu kanto vivece montris la revolucian spiriton de la laboruloj de la Orienta Han-dinastio malestimi la regantan klason kaj brave batali kontraŭ ĝi.

Ĝuste kiam okazis kamparanaj ribeloj en diversaj lokoj, pli grandskala ribelo estis aktive preparata de la Flavturbana Armeo. Ĝia organizanto kaj gvidanto estis Ĝang Giaŭ.


Ĝang Giaŭ loĝis en Gjulu (nun Pinghiang de Hebej) kaj sekrete faris inter popolamasoj propagandon kaj organizadon por insurekcio publike agante kiel religia predikanto kaj kuracisto. Por mobilizi kamparanojn al ribelo, li elmetis jenan revolucian devizon: "La blua ĉielo jam mortis kaj la flava ĉielo devas esti starigita." Tio aludis la kadukiĝon de la reakcia Orienta Han-dinastio kaj baldaŭan stariĝon de revolucia regpotenco de kamparanoj.

Ĝang Giaŭ ankaŭ deklaris, ke la sociaj riĉaĵoj devas esti komunaj kaj ne povas esti monopoligitaj de la feŭda imperiestro kaj malmultaj ŝtataj oficistoj; ĉiu devas labori kaj ricevi vestojn kaj manĝaĵon; kaj virinoj devas esti egalrajtaj al la viroj kaj ne devas esti mortigitaj. Tiuj ĉi progresaj politikaj asertoj ne nur estis forta provoko al la reakciaj instruoj de konfucianoj ke "la regpotenco de imperiestro estas donita de Dio", "tiuj, kiuj laboras intelekte, devas regi kaj tiuj, kiuj laboras fizike devas esti regataj", kaj "viroj estas noblaj kaj virinoj plebaj" ktp., sed ankaŭ spegulis la fortan deziron de la vasta amaso de kamparanoj sin liberigi de la subpremado de bienula klaso, tial ili ricevis varman subtenon de la popolanoj kaj multaj venis de malproksime por aliĝi al la insurekcia armeo.

Post klopodado de pli ol dek jaroj, Ĝang Giaŭ kaj liaj kunbatalantoj jam havis armeon kun centmiloj da homoj. La armeo agadis en vastaj regionoj de la basenoj de la Flava Rivero kaj Jangzi-rivero kaj eĉ en la tiama ĉefurbo Luojang troviĝis ilia sekreta punkto. Ili decidis fari ĝeneralan leviĝon en la kvina de marto, 184 p.K. Pro perfido la sekreta punkto de la ĉefubro estis detruita, tial Ĝang Giaŭ senhezite decidis leviĝi antaŭdate en februaro. Gvidate de Ĝang Giaŭ kaj liaj du pli junaj fratoj Ĝang Baŭ kaj Ĝang Liang, centmiloj da leviĝantoj faris ĝeneralan ofensivon al la Orienta Han-dinastio. Kun glavoj kaj lancoj en la manoj ili bataladis brave kaj nevenkeble kaj renomiĝis tra la tuta lando.

Ili bruligis ŝtatoficejojn, mortigis reakciajn ŝtatoficistojn, detruis domojn de bienuloj, batis lokajn tiranojn kaj reprenis la kampojn kaj riĉaĵojn perforte rabitajn. En malpli ol unu monato la insurekcio jam sin disvolvis tra la vasta regiono de la norda bordo de Jangzi-rivero ĝis Hebej-provinco kaj formis arkan ofensivon al la ĉefurbo Luojang.

La venkoj de la insurekcia armeo konsternis la kortegon de la Orienta




*La insurekcia trupo forte batis reakcian armeon.*


Han-dinastio. La lasta haste sendis trupojn por subpremi la insurekcion. La insurekcia armeo aktive atakis, obstine batalis, gajnis kelkajn venkojn en la komenco kaj devigis la kortegon ŝanĝi kelkfoje komandantojn.

La insurekcia armeo akiris grandajn venkojn en la milito. Sed ĝi estis dispartigita de bienulaj trupoj. Krome la leviĝo estis hasta, mankis al la insurekcia armeo milita sperto, kaj ĝi faris erarojn en strategio. En aŭgusto, ĝuste en ŝlosila momento de la batalo, ĝia gvidanto Ĝang Giaŭ malfeliĉe mortis de malsano. Ĝang Liang kaj Ĝang Baŭ heroe mortis baldaŭ en batalo unu post la alia, kaj ankaŭ la pli ol centmilo da leviĝantoj sub ilia komando oferis sian vivon.

Kvankam la ĉefa forto de la insurekcio estis sange subpremita, tamen ĝiaj trupoj dise lokitaj en multaj lokoj ankoraŭ persiste bataladis, iuj el ili daŭrigis la batalon dum pli ol dudek jaroj. Tiu insurekcio donis fortan kritikon al la doktrino de konfucianoj, faris baton al tiranaj bienuloj de diversaj lokoj kaj reakciaj ŝtatoficistoj, radikale ŝancelis la reakcian regadon de la Orienta Han-dinastio kaj akcelis disvolviĝon de la historio. Samtempe ĝi ankaŭ postlasis valoran sperton al la postaj insurekcioj de kamparanoj. La heroa batalo de la leviĝantoj ĉiam kuraĝigas la laborulojn fari nefleksеblan batalon kontraŭ la reakciaj regantoj.




# Novaj jadaj skulptaĵoj de Pekino



*Fea Kaverno*

Jadskulpta arto estas unu el la tradiciaj metiartoj de Ĉinio kaj havas longan historion. En longtempa verka praktikado jadskulpturo de diversaj lokoj iom post iom formis sian apartan stilon kaj ĝia tekniko altiĝis senĉese. Jadskulptaj metiartistoj povas fari diversajn tre belajn, diafanajn kaj delikatajn skulptaĵojn el jado utiligante la naturajn kolorojn kaj formojn de la materialo. De la Granda Proleta Kultura Revolucio, dank' al plenumo de la principo **"disfloru cent floroj"** kaj **"elŝovu novon el malnovo"**, teknikaj renovigoj de la ĉina jada skulpturo aperis unu post alia kaj ĉiujare kreiĝis aro da elstaraj verkoj de tradicia tekniko kaj aktuala signifo.

En la lastaj jaroj, surbaze de kritika heredo de la tradicia arta stilo, Pekino senĉese kreis novajn verkojn kun fortika kaj plaĉa plastiko kaj zorgema polurado, kaj iuj el ili ricevis laŭdojn en kaj ekster la lando. "Alvenas la Unua Trajno"



*Al Kamparo*



*Venas la Unua Trajno*


kaj "Al Kamparo" el turkiso, "Fea Kaverno" kaj "Poefago" el agato kaj "Nova Paŝtistino" el jado de Hjoŭjan estas novaj skulptaĵoj lerte faritaj en uzado de materialo kaj koloroj.

Lerte uzi materialon estas unu el la karakterizaĵoj de jada skulpturo. Jado estas relative rara kaj multkosta. En sia projektado kaj farado la metiartistoj devas preni temon laŭ la grandeco kaj formo de la materialo kaj fari el ordinara jado valoran kaj ĉarman artaĵon. La verko "Venas la Unua Trajno" estas farita el malgranda peco de jado, sur kiu oni skulptis tri jinaciecajn samfamilianojn, kiuj tenas bukedojn kaj balonojn en la manoj por varme bonvenigi tuj alvenontan trajnon. Ĝi prezentas la ĝojon de ji-oj loĝantaj en sudokcidenta montregiono de Ĉinio kun malfacila trafiko pro ekfunkcio de la fervojo de Ĉengdu ĝis Kunming. "Al Kamparo" el turkiso alta je dekkelkaj centimetroj prezentas vivecan kaj kortuŝan figuron de intelekta junulino kun granda idealo iri konstrui novan socialisman kamparon. Tiuj du skulptaĵoj estas bone komponitaj kaj faris novan provon en prezentado de aktualaj temoj sur malgranda peco de jado.

Lerta uzo de koloroj estas alia karakterizaĵo de jada skulpturo. La specoj de materialo uzataj de la pekinaj jadskulptistoj estas multaj, inkluzive de kristalo kaj koralo, kaj iliaj naturaj koloroj estas tre variaj. Troviĝas bluverda kaj blanka jadoj, kaj speco de jado eĉ havas kolorojn rozan, verdan, flavan kaj nigran. Pli belega estas agato kun variaj koloroj, kiuj donas pli da brileco al verkoj post zorgema projektado de metiartistoj. La verkoj "Poefago" kaj "Fea Kaverno" estas faritaj sur du pecoj de malsamaj agatoj. "Fea Kaverno" prezentas unu el la pejzaĝoj de Luŝan-monto en Gianghi-provinco de Ĉinio. Utiligante la originajn kolorojn de agato, la laboristoj prezentas versimile vesperkrepuskon, tumultajn nubojn, majeste starantajn pinojn kaj ondantajn montojn.

La materialo por jada skulptado estas tre malmola kaj fragila, sekve tre malfacile skulptebla. Por skulpti belegan kaj perfektan verkon laboristoj nepre devas havi eminentan teknikon kaj ekstreman paciencon kaj fari ĉiun tranĉon kun zorga pripenso. Sukcesa jada skulptaĵo ofte impresas per mirinda lerteco, kaj tre malfacilan skulptadon oni nomas "danĝera laboro". La

verko "Nova Paŝtistino" sukcese prezentas amindan figuron de intelekta junulino kiu sane kreskas sub la edukado de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Per alta tekniko la metiartisto skulptis sur fragila jado longan kaj maldikan stangon kaj ŝnuron por kapti ĉevalon. Ĝi ne nur impresas per siaj subtileco kaj diafaneco, sed ankaŭ elstarigas la revolucian sentimecon de la intelekta junulino en kaptado de ĉevalo. Ĝi ankaŭ estas bona ekzemplo en kritika heredo de la tradicia skulpturo kaj kreado de novaj temoj.



*Nova Paŝtistino*

La jada skulpturo komenciĝis en la malfrua periodo de neolitiko en Ĉinio. Sed en la malnova socio la kreajoj de tiu ĉi nacia metiarto ĉiam estis ĝuita kaj monopoligita de malmultaj homoj. Antaŭ la Liberiĝo, pro reakcia regado de Kuomintango kaj agresado kaj rabado de imperiismoj, la jadskulpta metiarto jam sin trovis en agonio. Multaj metiartistoj devis forlasi la profesion. La nombro de metiartistoj de Pekino malgrandiĝis de miloj ĝis du-tri centoj. Post la Liberiĝo, tiu metiarto de Pekino iom post iom restariĝis, precipe en la kultura revolucio, prospereco aperis en ĝi same kiel en tiu de la tuta lando. La maljunaj metiartistoj rejuniĝis pro revolucio kaj granda nombro da junaj metiartistoj sane kreskas. Lernante la krean sperton de revoluciaj modelaj teatrajoj, skulptistoj en siaj verkajoj elstarigis heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj emfaze spegulis la novajn fizionomiojn de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Kurantaj Aferoj

## PROSPERA DISVOLVIĜO DE LA TELEVIZIO DE ĈINIO

La televizio de Ĉinio, kiu naskiĝis en la granda antaŭensalto de 1958, prospere disvolviĝis en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Nun la nombro de televidaj stacioj kreskis de 7 antaŭ la kultura revolucio ĝis 37 kaj tiu de transsendaj stacioj atingis 123. Nun la televidaj programeroj de Pekino povas esti transsendataj al 23 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj tra mikroonda komunika sistemo. La nombro de televidaj riceviloj estas preskaŭ 11-oblo de tiu antaŭ la kultura revolucio.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio la televidaj laborantoj kritikis reviziisman linion de Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj Deng Hiaŭping, persiste prenas televizion kiel ilon de publika opinio por la diktaturo de la proletaro kaj diligente servas al politiko de la proletaro, al socialismo, al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La televidaj stacioj de diversaj lokoj entuziasme prikantas la Grandan Proletan Kulturan Revolucion kaj novajn socialismajn aferojn. Ili multe prezentas la brilajn revoluciajn modelajn teatrajojn kaj aliajn teatrajojn, filmojn, muzikojn, dancojn, *ĉjuji*-ojn kaj akrobatajojn aperintajn sub la instigo de la unuaj kaj forigis de la ekranoj artajn programerojn spegulantajn imperiestrojn, reĝojn, generalojn, ĉefministrojn, dandojn kaj belulinojn, servantajn al la ekspluataj klasoj. Iuj el la stacioj funkciigas televidajn kursojn pri politika teorio, agrikultura scio, medicino kaj higieno, elektroniko, meĥanika tekniko, interŝanĝo de novaj teknikoj kaj novaj teknologioj k.a. kiuj estas varme bonvenigitaj de la amasoj.

# Aŭskultu al esperanta disaŭdigo de Radio Pekino

**Por Japanio, Koreio**

**Pekina Tempo**

Sabato k Dimanĉo

19:00—19:30

**Ondoj(m)**

40 30

**Por Sudorienta Azio**

**Pekina Tempo**

Sabato k Dimanĉo

20:30—21:00

**Ondoj(m)**

30 25 19

**Por Eŭropo**

**Pekina Tempo**

Sabato k Dimanĉo

4:00—4:30

**GMT**

Vendredo k Sabato

20:00—20:30

**Ondoj(m)**

47 43 31 25



*Laboristinoj de la Ŝanhaja Kvara Radioaparata Fabriko produktas 12-colajn transistorajn televidilojn.*

# Novaj eldonaĵoj de Ĉinio en Esperanto:

## KANALO RUĜA FLAGO (indeksa n-ro: 15Es-1329p)

Tiu ĉi libreto konigas al la legantoj la Kanalon Ruĝan Flagon en Linhian-gubernio, Henan-provinco de Ĉinio. La akvoutiliga konstruaĵo farita de la popolanoj de Linhian kun senkompare brava revolucia spirito ĝisfunde finis la historion de sekeco kaj manko de akvo en tiu gubernio de mil kaj mil jaroj, akcelis plenampleksan disvolvon de agrikultura kaj industria produkto kaj alportas tute novan fizionomion al la socialisma ekonomio de Linhian-gubernio.

60 paĝoj kaj 20 fotopaĝoj 130 × 183 mm

Prezo: £ 0.3 US$ 0.3 DM 1.30 FF 1.60

## PRAMEJO LITORINKONKO (indeksa n-ro: 88Es-121p)

Tiu ĉi kolorofseta infana bildlibro priskribas, kiel la ruĝgvardianeto Gin Hajlan deĵoras en ferio anstataŭ sia patrino ĉe pramejo kaj helpas Ĝanĉjon, batalanton de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, transveturi la maron. La rakonto prikantas la bonan kvaliton de Hajlan timi nek malfacilon, nek danĝeron, kaj volonte helpi aliajn.

40 paĝoj 182 × 208 mm

Prezo: £ 0.15 US$ 0.40 DM 1.50 FF 1.90

## NORMAN BETHUNE EN ĈINIO (indeksa n-ro: 88Es-125p)

Tiu ĉi bildlibro rakontas, kiel kamarado Norman Bethune faris brilajn kontribuojn al la liberiga afero de la ĉina popolo, kun alta internaciisma kaj komunisma spirito kaj sindonemo al la laboro dum sia restado en Ĉinio.

116 paĝoj 185 × 172 mm

Prezo: £ 0.18 US$ 0.45 DM 1.80 FF 2.30

## RAKONTOJ PRI RUĜGVARDIANETOJ (indeksa n-ro: 88Es-126p)

Tiu ĉi estas kolora infana bildlibro karikatura. Ĝi enhavas 12 rakontetojn: "Sur la vojo al la lernejo", "Flikado de Librosako", "Alporto de Trinkakvo al la Kampo", "Atendo de Aŭtobuso" ktp.

La bildlibro estas postlabora verko de presisto. La pentrajoj kun intensa vivetoso vivece priskribas la bonan moralon de la ĉinaj ruĝgvardianetoj esti helpemaj kaj ami la kolektivon.

42 paĝoj 252 × 120 mm

Prezo: £ 0.14 US$ 0.35 DM 1.40 FF 1.80

## KRUTAĴO FLUGANTA AGLO (indeksa n-ro: 88Es-127p)

Tiu ĉi bildrakonto, tra la antecedentoj kaj kreskado de Ŝiulipin, filino de malriĉ-kamparano de Jaŭ-nacieco, klare kaj vivece priskribas la grandan ŝanĝiĝon de Jaŭ-nacieco post la Liberiĝo kaj ankaŭ elmontras ĝian brilan kaj belegan perspektivon.

156 paĝoj 186 × 172 mm


Prezo: £ 0.22 US$ 0.55 DM. 2.20 FF 2.80

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Ĝenerala Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio

Mendu ĉe nia agenta librejo aŭ ĉe la Esperanta peranto en via loko aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

# Pentristeto

de **GUO LIANG**



# Medicino en servo al la kamparo



Dung-naciecaj infanoj varme akceptas kuracan taĉmenton de ĈPLA.



Korea nudpieda kuracistino Gin Fengzi de Janbian survoje al paciento

Kuraca tacmento de Fenghuang-gubernio de Hunan-provinco faras enketadon pri oftaj kaj ripetiĝemaj malsanoj en montregiono.






Kuracistino de ŝanhaja kuraca taĉmento ekzamenas infanojn de kamparanoj en fiksita periodo.

Nudpiedaj kuracistoj de Linhian-gubernio de Henan-provinco rapidas al paciento en pluvo.





Antaŭ 4 jaroj, kiam Halidajmu (la maldekstra) estis 7-jara, kuracistoj de kultivejo de Hingiang sukcese faris ortopedian operacion al ŝiaj deformiĝintaj piedoj, kaj nun ŝi jam povas danci.






Kolektado de drogherboj



Naŝi-nacieca junulino, kiu finis studadon en la Junnan-a Instituto de Ĉina Medicino, entuziasme servas al popolanoj de montvilaĝoj kaj ricevis multajn laŭdojn de ili.



Silka ventumilo



Ventumiloj el eburo aŭ santalligno

# Ventumiloj de Suĝoŭ



Pentrado sur ventumiloj

世界语《中国报道》一九七六年第九期（本刊代号：二——九一五）



12859
BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL